

# La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2020. №3



## Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2020. №3 (305)

Ekde 2017 *La Ondo de Esperanto* aperas nur elektronike, kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

**Aperas** ĉiusezone. Senpaga literatura suplemento jarfine.

**Fondita** en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

**Eldonas kaj administras:** Halina Gorecka

**Redaktas:** Aleksander Korĵenkov

**Konstantaj kunlaborantoj:** Paweł Fischer-Kotowski (vicedaktoro), Peter Baláž, István Ertl, Irina Gonĉarova, Povilas Jegorovas, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Paŭlo Moĵajevo, Sergio Pokrovskij

**Poŝta adreso:** RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

**Retpoŝtaj adresoj:** sezonoj@kanet.ru, sezonoj@yahoo.com

**Retejoj:** <http://esperanto-ondo.ru>, <https://sezonoj.ru>

### Abontarifo por 2021

Abonanto: 15 eŭroj, 17 usonaj dolaroj, 60 zlotoj, 850 rubloj

Amiko: 30 eŭroj, 33 usonaj dolaroj, 120 zlotoj, 1700 rubloj

Patrono: 100 eŭroj, 110 usonaj dolaroj, 400 zlotoj, 5500 rubloj

### Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (3000 ruslandaj rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (900 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (600 rubloj)

Triona rabato pro ripeto.

**Donacoj:** La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto “avko-u” ĉe UEA.

**Recenzoj:** Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

**Represoj:** Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2020, №3 (305).

Ежеквартальный журнал на языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ №77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 5 октября 2020 г.

Bazaj informoj pri <i>La Ondo de Esperanto</i> .....	2
En ĉi tiu numero .....	3
<b>Temo</b> .....	<b>5</b>
Sonja Zaretskaia. Retevent kunigas la homojn.....	6
Amri Wandel. Esperantumi kun la koronaviruso .....	7
<b>Intervjuo</b> .....	<b>12</b>
Paweł Fischer-Kotowski. Osmo Buller: Mi ne bezonas penti: Intervjuo kun Osmo Buller .....	13
<b>Eventoj</b> .....	<b>17</b>
Rafael Henrique Zerbetto. Virtuala Kongreso: pli bona ol atendite! .....	18
Albert Stalin Garrido, Charlotte Scherping Larsson, Snehaja Venkatesh, Antonia Montaro. La unua reta IJK – tutmonda ponto virtuala kaj junulara ...	20
Daria Slonova. Reta SES 2020 – rekorda, alia, defia .....	23
Mireille Grosjean. Sukcesa VEKlĝo de ILEI .....	24
Przemysław Wierzbowski. SAT kongresis virtuale .....	25
Albert Stalin Garrido. Filipinaj junuloj strebas por nova FEJ .....	25
Ilona Koutny, Ida Stria, Michael Farris. Rekorda Interlingvistika Simpozio .....	27
Universitataj kursoj de Esperanto .....	28
Petro Zilvar, Zsófia Kóródy. La Esperanto-urbo daŭre aktivas. Virtuale kaj reale.	29
Paweł Fischer-Kotowski. En kastelo kun maskoj .....	31
Povilas Jegorovas. La ĵurnalista seminario okazis malgraŭ la pandemio. ....	32
Povilas Jegorovas. La Zamenhofa ekspozicio plu migras tra Litovio. ....	33
Gong Xiaofeng (Arko). Esperanto-kurso ĉe la universitato de Nanchang. ....	34
La KCE-Komitato kunvenis pri 2021 .....	35
Survoje al “svisa skolo” de tradukarto .....	36
Irina Gonĉarova. Ĝuo instrui Esperanton al infanoj .....	37
Jadwiga Greger. Paganoj ĉe la Balta Maro .....	39
Humphrey Tonkin: Honora Prezidanto de UEA .....	40
Premio Grabowski 2020 al Bertilo Wennergren .....	41
14 diplomitoj pri elstara agado .....	42
Belfasto: Lumo de Espero. ....	43
La malnova Centra Oficejo ne plu ekzistas... ..	43
Mireille Grosjean. Francio: Informoj por 55 mil lernejoj .....	43
Claude Nourmont. Paralelaj studsesioj en Kvinpetalo. ....	44
Alois Eder. Gaja kaj aktiva Esperanto-semajnfino en Rottweil .....	44
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Pajo por ĉiam forlasis nin .....	45
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Eugène de Zilah forpasis. ....	46
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Ni funebras kaj kondolencas .....	46



Koncize (11 informoj) .....	47
<b>Tribuno</b> .....	<b>48</b>
Amri Wandel. Israelo: la plej infektita lando tutmonde, sed ankaŭ la plej resaniĝa .....	49
Stanislav Belov. Lukto por egaleco, aŭ Bombonoj kaj mono .....	55
Deklaracio de la 93-a Kongreso de SAT .....	62
Deklaro de UEA okaze de la Internacia Tago de Paco .....	63
Deklaro de UEA okaze de la Internacia Tago de Ne-perforto .....	63
Ines Kahin. Volontuli en Bjalistoko .....	64
<b>Arkivo</b> .....	<b>65</b>
Aleksander Korĵenkov. Jubileoj kaj memordatoj en oktobro 2020 .....	66
Povilas Jegorovas. Jubileo de Aleksandras Dambrauskas .....	68
<b>Kulturo</b> .....	<b>69</b>
Miĥail Bulgakov. La majstro kaj Margarita: Romanfragmento (Tradukis el la rusa Sergio Pokrovskij) .....	70
Ewa Grochowska. Patrino letero .....	94
Bertilo Wennergren. La nova eldono de PIV .....	97
Sten Johansson. Vojaĝo kun Hans Glas .....	98
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Literaturaj programeroj de <i>Radio Esperanto</i> .....	104
Paulo Sérgio Viana. Du nomoj .....	105
Nicola Ruggiero. Parludo .....	107
Wolfgang Kirschstein. Oskaro – ne plu tiom blanka? .....	108
Olga Niesterowicz. Albumo profesie registrita, iom retrostila, tamen tro monotona (Recenzo: TIM. <i>Vaganto</i> ) .....	111
Halina Gorecka. <i>Beletra Almanako</i> , 2020, №37 .....	112
<i>Kazohinio</i> aperos en la franca lingvo .....	113
<i>Literatura Foiro</i> , 2020, №306, 307 .....	114
Ankie & Nanne. <i>Sen Timo</i> : Kant-video kaj manifesto de <i>Kajto+</i> .....	115
Sonja Zaretskaia. PMEG 2020 devas ne manki en via libroŝranko .....	116
Przemysław Wierzbowski. <i>Baladina</i> de Juliusz Słowacki en Esperanto .....	117
Unesko eldonis unuan libron en Esperanto .....	118
Rezultoj de la Belartaj Konkursoj de UEA en 2020 .....	119
Interkultura Novelo-Konkurso .....	120
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. 250 tagoj da ĉiutaga informado en nia retejo .....	121

Sur la kovropaĝo estas la pentraĵo “La Somera Ĝardeno en aŭtuno” (1928) de Isaak Izraileviĉ Brodskij. (La Somera Ĝardeno estas fama parko en Peterburgo, establita en 1704.)

# *Temo*



**Danke al la persista laborado de la nelacigeblaj teamanoj de la internacia junulara organizo Edukado@Interreto (E@I) UK, IJK kaj kelkaj aliaj gravaj esperantistaj kongresoj kaj renkontiĝoj, kiuj ĉi-somere ne povis okazi reale pro la pandemiaj limigoj kaj malpermesoj, ja okazis – kiel virtualaj eventoj – helpe de la renkontiĝa platformo “Retevent”. Gratulon al la eĉeianoj kaj al ilia gvidanto Peter Baláž!**

# *Retevent kunigas la homojn*

Retevent.com estas nova enreta renkontiĝa platformo, kiu celas helpi okazigon de virtualaj eventoj: seminarioj, kongresoj, konferencoj kaj aliaj renkontiĝoj. Ĉi tiu platformo proponas plurajn funkciojn por plenumi la dezirojn de la partoprenantoj de virtualaj/interretaj aranĝoj. Ĝi nun – pro la pandemia stato – parte anstataŭas la fizikajn eventojn, sed estonte eblos tute bone ĝin uzi kiel “aldonan platformon”, ekzemple, por kunigi homojn/membrojn, kiuj ne povus renkontiĝi fizike.


Ĉi tiu reta platformo por virtualaj eventoj estis kreita de la internacia neregistara organizaĵo E@I. La nomo de la platformo devenas de Esperanto: temas pri mallongigo de “reta evento” = retevent’. Tiu nomo plene klarigas la sencon kaj celon de tiu platformo.

Retevent estis kaj estas uzata por kelkaj internaciaj virtualaj aranĝoj, inter kiuj estas, ekzemple:

- Polyglot Gathering Online 2020
- 76a IJK (Internacia Junulara Kongreso) de TEJO
- Virtuala SES 2020 de E@I
- VEKI (Virtuala Esperanto Konferenco de ILEI)
- VK (Virtuala Kongreso) de UEA
- 5a Interlingvistika Simpozio de Universitato Adam Mickiewicz en Poznano
- Reta Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko 2020

**Sonja Zaretskaia**

E@I



# *Esperantumi kun la koronaviruso*

**de Amri Wandel**

## **Kiel nomi la viruson?**

Mia rilato al la koronavirusa pandemio komenciĝis per Esperanto. Komence de februaro la Lingva Konsultejo de la Akademio de Esperanto ricevis demandon, kiel nomi la novan viruson. Post longa diskuto ni rekomendis du variantojn: “koronviruso” kaj “kronviruso” (tiu familio de virusoj estis nomita “coronavirus” laŭ ĝia aspekto en elektrona mikroskopo, kiu similas al la suna korono aŭ al krono, ambaŭ estas “corona” en la latina). Mi uzas la unuan, laŭeble en la formo “korona viruso” kiu havas la avantaĝon, ke ĝi tre similas al la internacie uzata formo “coronavirus”. Iuj pledas por la radika formo “koronaviruso”, kiun la Akademio ne rekomendis. Interesa artikolo kaj sekva diskuto pri la Esperanta nomo de la viruso aperis en la retejo UEA.facila: <https://uea.facila.org/artikoloj/lingvo/kiel-nomi-tiun-viruson/>

## **Novaj rubrikoj**

La evoluon de la epidemio mi akompanis en la nova rubriko “Fake, Science, Profesie tra la mondo”, ekde la marta numero de la revuo *Esperanto*, kaj ekde la komenco de februaro ankaŭ per semajnaj raportoj en la Facebook-paĝo de UEA. En la afiŝo de la 22a de marto mi skribis “De mia antaŭa raporto pasis apenaŭ unu semajno, sed ŝajnas ke la mondo renversiĝis. En Ĉinio la epidemio efektive finiĝis, sed en la tuta mondo la nombro de infektitoj estas jam trioble tiu de Ĉinio kaj la nombro de mortintoj – kvaroble”. Neniu povis tiam imagi, ke dum unu monato kaj duono tiuj nombroj kreskos kvindekoble.

Por sekvi la rapide ŝanĝiĝantan situacion, mi lanĉis kaj daŭre ĝisdatigas la ret-ejon [https://revuoesperanto.org/korona\\_viruso](https://revuoesperanto.org/korona_viruso). En ĝi oni povas sekvi la ĝeneralan staton de la epidemio, kiel ĝiajn implicojn en Esperantujo.

## **Virtuala Kongreso anstataŭ la Universala**

La sekva defio estis la Universala Kongreso. La Estraro de UEA zorge sekvis la situacion. En februaro la epidemio ankoraŭ aspektis kiel loka problemo de Ĉinio. Supozante ke ĝis aŭgusto la krizo pasos, oni esperis okazigi la 105an UK kiel planite. En marto mi fariĝis la estrarano respondeca pri la koronavirusaj aferoj kaj pri la tiurilataj Gazetaraj Komunikoj.

La korona viruso klare demonstris la staton de “tutgloba vilaĝo”: la epidemio komenciĝis en la ĉina provinco Hubei, kaj unue ĝi estis konsiderata loka problemo. Komence de februaro UEA sendis subten-mesaĝon al la ĉinaj esperantistoj. Unu monaton poste la Monda Organizaĵo de Sano deklaris ĝin pandemio, kaj meze de marto jam evidentiĝis, ke la UK en Montrealo ne povos okazi kiel planite. Sekve, interkonsente kun la kongresejo kaj la LKK la Estraro anoncis la decidon prokrasti la Montrealan Kongreson al la jaro 2022.

Paralele al la nuligo de la ĉeesta kongreso, la Estraro de UEA ekplanis alternativan virtualan eventon. Miajn ideojn pri la naturo de tiu evento mi rakontis fine de marto en intervjuo al Ĉina Radio (<http://esperanto.cri.cn/2521/2020/03/29/180s209951.htm>). Meze de aprilo UEA komunikis, ke la Virtuala Kongreso (VK) estas planata por la komenco de aŭgusto kaj provos reprodukti la esencajn elementojn de la UK en virtuala formato, kaj samtempe enkonduki novajn ideojn.

Iom post iom evoluis la koncepto, kaj mi prezentis ĝin en prelego dum la virtuala Malferma Tago fine de aprilo kaj komence de majo dum la 64a AMO-seminario <https://www.youtube.com/watch?v=mc-Bttj7IWw>.

En tiu prelego, “La viruso kaj Esperanto” mi ankaŭ aŭguris, ke:

- Homoj fariĝos pli toleremaj, kunlaboremaj, paciencaj, kaj lernos pli aprezi la sanon, la medion, la vivon.
- Plivastiĝos reta studado kaj retaj kursoj, inkluzive de Esperanto-kursoj kiel Duolingo.
- Internaciaj kontaktoj pli vaste okazos per la retaj rimedoj, okazos pli da virtualaj kunvenoj, naciaj kaj internaciaj.

**Ĝi estas demonstra versio de la 123-paĝa aŭtuna *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**



# Intervjuo




Estas neeble en ĉi-aŭtuna eldono de *La Ondo* ne menciĝi la 70-jariĝon de Osmo Buller, kiu okazos la 12an de novembro. Ja danke al lia kompetenta, diligenta kaj talenta agado, kiu malofte estis adekvate aprecata, UEA dum multaj jaroj funkciis stabile kaj solide, kiel decas al monda esperantista asocio. Ni dankas Osmon pro lia konsento respondi la demandojn de nia vicredaktoro kaj deziras al li multajn serenajn vivojarojn kaj sukcesojn en liaj sociaj agadoj!

# *Osmo Buller:* *Mi ne bezonas penti*

**Tio ne estas originala: vi esperantistiĝis kiel junulo. Tamen malantaŭ ĉiu esperantistiĝo kaŝiĝas iu rakonto – kiel estis ĉe vi?**

Kiel knabo mi eksciis pri Esperanto el diversaj fontoj, sed mi efektive eklernis ĝin rezulte de unu el miaj hobiaj, la DX-aŭskultado, t. e. aŭskultado de eksterlandaj radioelsendoj. Mi ofte aŭskultis al la Pola Radio, kies Esperanto-elsendo finiĝis tuj antaŭ la finna, pro kio mi ofte aŭdis ĝian finon. Kiam mi eksciis, ke ankaŭ aliaj stacioj elsendas Esperante, mia apetito estis vekita kaj mi eklernis la lingvon. Tiam mi estis 15-jara. Mia aktiva lernado tiam ne daŭris longe, sed en 1968 mi eksciis, ke post unu jaro okazos UK en Helsinko. Mi revenis al intensa studado, iris al la UK kaj la resto estas historio. Cetere, en aprilo 1969 mi rakontis en letero al la Pola Radio pri ĝia rolo en mia esperantistiĝo kaj per tio mi gajnis la romanon *La faraono* de Prus kiel premion pro la plej interesa letero de la monato. Ankoraŭ antaŭ la UK mi legis tiun tradukon de Kabe preskaŭ unuspire.



Osmo Buller en 1969

**Vi estas la plej longdaŭra direktoro en la tuta historio de UEA. Dum via deĵorado vi proponis kaj enkondukis plurajn novigojn, kiuj el la hodiaŭa vidpunkto ŝajnas jam la bazo, ekzemple, Gazetaraj Komunikoj de UEA kaj la Malferma Tago de la Centra Oficejo. Kion ankoraŭ vi ŝatus fari, se vi estus ĝenerala direktoro pliajn jarojn?**

Se vi celas, ke en 2016 mi ne emeritiĝus sed restus direktoro, mi ne povus fari ion alian ol klopodi rezisti la malkonstruadon de la CO fare de laŭvicaj estraroj. Se vi celas, ke mi nun revenus al tiu posteno, kio ja ne plu okazos, mi devus fari la samon kiel post mia reveno en 2004, nome, restarigi la normalan funkciadon de la CO. Tio estus vere diabla, se ne jam malebla tasko. Dum mia lasta periodo ekde 2004 mi apenaŭ plu povis entrepreni ion alian krom certigi la funkciadon de la CO. La estraro elektita en la Zagreba UK en 2001 reduktis la stabon, i.a. per nuligo de la oficeja direktoro. Por mi tio signifis multe da aldonaj taskoj, kiujn mi ne havis antaŭe. Tiu antaŭa periodo estis rezultodona, ĉar mi havis tempon ankaŭ por aliaj

krom rutinaj direktoraj laboroj. La unua ondo de amputado de la CO en 2002 kaŭzis multe da damaĝo, kiun oni poste sukcesis parte ripari dank' al la kapabla kaj sindona oficistaro. Nun ĉio statas pli malbone.

**En la CO vi laboris eble sur ĉiuj postenoj, ĉar vi venis kiel kongresa oficisto, baldaŭ vi iĝis direktoro de la CO, sed kiam necese dum pli aŭ malpli longaj periodoj vi zorgis pri la libroservo, redaktis la revuon kaj la Jarlibron, ŝajne eĉ librotenis. Kiun el tiuj taskoj vi ŝatis plej multe kaj kial?**

Nenio malplaĉis, sed eble plej multe mi ŝatis redaktadon, ĉar jam kiel junulo mi redaktis lernejan gazeton kaj en la politika agado verkado kaj redaktado estis miaj taskoj. Estis plezuro kontribui al la redaktado de la revuo *Esperanto* per kunkpensado kun la redaktoro, kiam tiu ankoraŭ laboris en la CO, kaj per artikoloj, ekzemple por la rubriko "Malferme", kiun István Ertl enkondukis en 1998. Lastatempe la ideo malantaŭ tiu rubriko malfeliĉe perdiĝis. Tio okazis ankaŭ pri Gazetaraj Komunikoj, kies lingvon, stilon kaj formon mi ne plu rekonas kiel ion fonditan de mi, precipe ĉar ilian lingvan sinprezenton mi trovas forpuŝa, same kiel la nunan lingvouzon de UEA pli ĝenerale. Kiel direktoro mi estis ankaŭ eldona redaktoro. Kun nostalgia fiero mi nun rigardas sur miaj bretoj verkojn, kies realigon mi partoprenis kaj kelkajn el kiuj mi iniciatis. Mi bedaŭras, ke poste la eldona aktiveco de UEA praktike estingiĝis.

**Vi modernigis kaj fortigis la oficejon, sed nun la tendenco estas mala: la estraro preferus maldungi la oficistojn, anstataŭigi ilin per volontuloj, limigi la taskaron, eble transloki la oficejon. Kion vi opinias pri tiuj evoluoj? Se tio dependus nur de vi, kion vi decidus? Kiun rolon devus plenumi la oficejo en la tria jardeko de la 21a jarcento?**

Kulminas la evoluo, kiu komenciĝis post la elekto de Kep Enderby kiel prezidanto en 1998. Anstataŭ daŭrigi la sukcesan Kampanjon 2000, kiun lanĉis lia antaŭulo Lee Chong-Yeong, sen interkonsiliĝi kun aliaj Enderby subite deklaris, ke UEA estas organizaĵo por homaj rajtoj, kvankam tio ne apartenis al la celoj menciitaj en la statuto de UEA. Komenciĝis evoluo, el kiu rezultis, ke perdiĝis la identeco de UEA kiel la ĉefa organizaĵo por Esperanto kaj esperantistoj. En tiu tempo la sukcesa laboro de la CO vekis ĵaluzon kaj laŭtiĝis voĉoj, ke la Centra Oficejo estas "tro forta". Sekve evoluis konflikto inter la Centra Oficejo, precipe mi, kaj la estraro, kiu eksplodis en la demisioj dum la Zagreba UK en 2001.

**Ĝi estas demonstra versio de la 123-paĝa aŭtuna *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# Eventoj



La Kongresa Sezono ja okazis en Esperantujo, kvankam plejparte nur virtuale. Tamen jam funkcias la Esperanto-centroj, kaj kelkaj renkontiĝoj estis organizitaj, kaj pliaj estas planitaj. Ni esperas, ke la malvirtualiĝa tendenco fortikiĝos, sed ... ni vivos kaj vidos, ĉu en multaj lokoj la esperantistoj tintigos la glasojn je la Zamenhofa Tago.



## Virtuala Kongreso: pli bona ol atendite!

Finiĝis la unua VK – Virtuala Kongreso de UEA. Kreita por anstataŭi la ĉi-jaran UKon, tiu kongreso ricevis laŭdojn de multaj esperantistoj tra la mondo. En ĝi partoprenis 1833 homoj el 94 landoj, multe pli ol en la kutima UK, inkluzive de tiuj kiuj kutime ne sukcesas, pro monmanko aŭ malfacilaĵoj por akiri vizon, vojaĝi al internaciaj kongresoj eksterlande.

Samkiel la kongresejoj de IJK kaj VEKI, ankaŭ la kongresejo de VK havis babilejojn, nomitajn Kafejo, Koridoro kaj Librejo, kaj ili estis pli bone uzataj ol en pasintaj kongresoj, ĉar fine de sia prelego, la preleganto havis la eblecon inviti la homojn al unu el tiuj ĉambroj por komenti aŭ fari demandojn pri la ĵusokazinta prelego. Mi aparte ŝatas tiun eblon, ĉar dum la prelego ne eblas vidi la spektantojn, kaj demandojn oni povas fari nur skribe, sed la babilejo permesas pli proksiman interagon inter preleganto kaj la publiko.

Tradiciaj UK-programeroj sukcese okazis en virtuala formo: Kleriga Lundo, Internacia Kongresa Universitato (IKU), seminarioj de AIS, Movada Foiro... Ili ĉiuj okazis rete. Virtuala Movada Foiro estis malsimila al la kutimaj movadaj foiroj, ĉar vizitantoj restis pli longe ĉe iu budo (fakte babilejo), kaj eksponantoj povis prezenti al ili aŭdvidan enhavon surekrane. Miaopinie ĝi estis pli facila por eksponantoj, kiuj ne bezonis kunporti multegon da materialo al kongresejo, pli oportuna por vizitantoj, kiuj povis pli trankvile kaj komforte informiĝi pri la laboro de Esperanto-organizoj, kaj pli mediamika, ĉar ĝi produktis nek rubaĵon, nek bruegon.

Kadre de la programo de la Kleriga Lundo mi spektis la prelegon de prof. Ilona Koutny, kaj poste mi vidis ankaŭ tiun de Mirejo. La prelego de Ilona estis la unua de mi spektita, kiu poste fariĝis agrabla babilado en la kongresa librejo.

Pri la scienca programo de la kongreso, sufiĉas la rakonto de Amri Wandel dum la Solena Fermo de la kongreso: ĉiujare ĉirkaŭ cent homoj aĉetas la libron kun la tekstoj de IKU-prelegoj, sed ĉi-jare estis publikigita nur bitlibro, eĉ ŝutebla senpage, kaj ĝis la fino de la kongreso ĝi estis eĉ ŝutita de pli ol 2000 homoj! Laŭ mi tio atestas, ke per interreto eblas atingi pli da homoj, kaj ankaŭ ke interreto fariĝis gravega ilo por diskonigado pri sciencoj.

Amri Wandel ankaŭ brile kunordigis la ekskursan programon: kvankam ne eblis ĉi-foje okazigi la tradiciajn kongresajn ekskursojn tra la gastiganta lando de la kongreso, eblis almenaŭ virtuale ekskursi tra la tuta mondo, kaj ni povis virtuale viziti landojn kiel Tanzanio kaj Kolombio, kiuj ankoraŭ neniam gastigis UKon.

Ankaŭ la koncertoj estis altkvalitaj kaj tre interesaj, sin prezentis la artistoj Kaŝi (kiu malkaŝis sin antaŭ la kamerao), Ĵomart kaj Nataŝa, Perla Mielo, jOmO, Amir Naor kaj Gijom'. Kelkaj koncertoj estis antaŭe registritaj kiel filmeto, dum aliaj okazis rekt-elsende.



**VIRTUALA KONGRESO  
DE ESPERANTO**

Post sperti tri malsamajn virtualajn kongresojn, mi povas diri, ke kelkaj homoj pli bone adaptiĝis al gvidado de virtuala aktivaĵo. Ekzemple, jOmO sukcesis krei bonegan etoson por sia virtuala koncerto, dum kelkaj prelegantoj sentis sin malkomfortaj por paroli antaŭ kamerao (mi mem sentis tiun embarason dum la unuaj minutoj de miaj prelegoj en IJK kaj VEKI, sed en VK mi jam sentis min komforta por paroli antaŭ kamerao). La koncerto de Gijom' ne estis rekte elsendita, sed li sukcesis kapti la atenton de la publiko per interesaj rakontoj pri sia muziko.

Sed mi devas agnoski, ke prelego dum Virtuala Kongreso kaptis malpli da atenton: oni povas aŭskulti ĝin kaj fari alian aferon samtempe, aŭ simple fari alian aferon unue kaj spekti la prelegon poste. Babiladoj estas la plej efika maniero interagi kun aliaj homoj en virtuala kongreso, speciale kiam ili uzas kameraon, kaj ĝuste en tiu punkto VK estis aparte bona: en ĝi babilejoj abundis pro tri kialoj:

1. La kongresa programo estis 24-hora ĉiutage, kaj por certigi, ke kongresanoj ĉiam havu ion por fari en la kongreso, estis kreitaj specialaj programoj kiuj konsistis en babiladoj pri iu aparta temo, kiel fotado, biciklado, kuirado, ktp.

2. La Virtuala Movada Foiro estis aro da babilejoj.

3. Estis kreitaj novaj programeroj sub la nomo "Babilu kun...", kiuj konsistis en babiladoj pri iu temo sub gvido de iu koncerna homo, kiu povis aŭ gvidi la debaton inter la partoprenantoj aŭ simple prezenti ion kaj respondi demandojn. Laŭ mi tiu modelo de "Babilu kun..." estas bonega por virtualaj kongresoj kaj meritas esti aparte atentata en la venontaj similaj eventoj.

Finfine, mi volas dividi kun vi mian sperton kiel preleganto en IJK, VEKI kaj VK. Malantaŭ ĉiu prelegejo estis teknikisto de E@I tre atenta pri la prelego. Malmultaj homoj rimarkis ilian laboron, ĝuste pro tio ke ili ĝin bone faris, sed prelegantoj devis alveni frue al la ĉambro, kaj por solvi eblajn teknikajn problemojn, kaj por trakti kun teknikisto detalojn, ekzemple en kiu momento de la prelego eblus respondi demandojn de la publiko, kiam kaj kiel montri la preleganto(j)n surekrane, kiam kaj kiel montri lumbildon/foton/filmeton, ktp. Teknikistoj estis tre atentaj dum la prelego, por montri lumbildon sur la ekrano post aŭdi la preleganton diri iun specifan frazon aŭ komenci paroli pri specifa temo, kaj estis pretaj por kolekti la demandojn de la publiko kaj trakti ilin kun prelegantoj (kutime per privata babilejo) pri kiam kaj kiel respondi ilin. Kaj tiu laboro estis tute en Esperanto! En UK prelegantoj kutime bezonas uzi la anglan aŭ eĉ peti helpon de loka esperantisto por klarigi simplan aferon al teknikisto de la kongresejo, sed nun ni povas fieri pri tio, ke en niaj virtualaj kongresoj estas internacia teamo de teknikistoj kiuj flue parolas nian lingvon kaj provizas altkvalitan servon!

**Rafael Henrique Zerbetto**

Laŭ *El Popola Ĉinio*

**Iĝu abonanto de "La Ondo de Esperanto"!**

## La unua reta IJK – tutmonda ponto virtuala kaj junulara



Tranaĝante la grandan ondon de la nova realo en la pandemia tempo, Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) havis la unuan vicon eniri novan punkton en la historio de la internaciaj esperantistaj organizoj, kiam ĝi okazigis la unuan Internacian Junularan Kongreson (IJK) en la interreto ekde la 10a ĝis la 18a de julio 2020. En la kongreso partoprenis 316 esperantistoj el 52 landoj, interalie danke al la eblo partopreni en la kongreso senpage.

La 76a IJK, kiu originale devus okazi en Someren (Nederlando) en la sama semajno, estis nuligita en aprilo – nur malpli ol tri monatojn antaŭe. La organizantoj, Nederlanda Esperanto-Junularo (NEJ), tuj poste anoncis, ke la IJK anstataŭe okazus virtuale kaj rekomencis kolekti aliĝojn. Komence multaj ne havis tute klaran bildon pri tio, kiel la kongreso en tiel granda skalo realiĝus, sed ĝi ebligis pro la teknika kaj homrimeda subteno de Edukado@Interreto (E@I), kiu utiligis novan retan platformon, en kiu ĉiuj programeroj kaj pluraj aliaj funkcioj estis unuece kaj organizite montrataj, kvazaŭ kongresejo. Tiu platformo estis finkreita nur dum la pandemia tempo, kaj estis unuafoje uzita en majo por la Poliglota Renkontiĝo.

La temo de la reta IJK estis “Tutmonda solidareco”, kaj dum ĝi okazis diversaj programeroj, kiuj substrekis la ideojn de solidareco inter diversaj grupoj kaj la tutmondiĝo de la agado por junularo en kaj ekster Esperantujo. Inter tiuj pluraj laŭtemaj programeroj estis prelego pri aliancaneco, paneldiskutoj pri hejmlaborado kaj pri virinaj rajtoj, diskutoj pri minoritataj lingvoj, kaj prezentoj de diversaj kulturoj kaj talentoj dum Mondovizio, la muzika programo. Samtempe troviĝis ankaŭ konstantaj neformalaj vidbabilejoj, kiuj imitis la etosojn de konataj kongresaj lokoj: Koridoro (por babili atendante programerojn), Trinkejo (por babili trinkante teon, kafon, aŭ eĉ alkoholaĵon), kaj Gufujo (speciala ĉambro por ĝenerale malstreĉiĝi). Ankaŭ estis Manĝejo, en kiu homoj povis trankvile kaj “kune” manĝi (kaj eĉ kuiri), kvazaŭ kongreseja kafeterio.

Tri junuloj rakontis siajn spertojn kaj opiniojn pri la okazinta reta IJK: Charlotte Scherping Larsson (Germanio), la ĵus elektita prezidanto de TEJO, Snehaja Venkatesh (Barato), kiu partoprenis en la IJK la unuan fojon, kaj Antonia Montaro (Svedio), kiu kunorganizis la kongresan programon.

**Ĝi estas demonstra versio de la 123-paĝa aŭtuna *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

## Reta SES 2020 – rekorda, alia, defia

La pandemio ŝanĝis la mondon kaj igis la homaron rapide adaptiĝi al la nova situacio. Ĉio, kion antaŭe eblis organizi fizike kaj senembarase, subite postulis alian aliron. Tial la E@I-teamo multe laboris kaj kreis specialan, unikan virtualan Esperanto-lernejon kie eblis lerni Esperanton dum Somera Esperanto-Studado (SES) kaj samtempe resti hejme kaj enrete, de la 18a ĝis la 26a de julio 2020.

La unua tasko por lernantoj estis registriĝi kaj plenigi aliĝpeton. 183 partoprenantoj el 38 landoj plenumis tion. Tio ne estas la plej alta nombro da partoprenantoj dum la 14 jaroj de la ekzisto de SES, sed okazis la vera rekordo rilate al nombro de landoj, de kiuj estis retkonektitaj niaj lernantoj.

Sekve la partoprenantoj konatiĝis kun nia platformo retevent.com, kiu estas unika en la Esperanto-mondo. Ĝi ebligas partopreni kursojn, vidbabilejojn, tekstbabilejojn, vidi spektaklojn dum reala tempo kun aliaj lernantoj samtempe. Vera kombinaĵo de diversaj utilaĵoj rekte en unu loko!

Alte taksis ĝin ankaŭ niaj instruistoj Marion Quenut, Christophe Chazarein por A2-nivelo; Arina Osipova, Przemysław Wierzbowski por B1-nivelo; Szabolcs Szilva, Tim Morley por B2-nivelo; Konstantin Tikhomirov por C1-nivelo, Mikaelo Bronŝtein kiu gvidis kurson pri tradukado, Oleg Ĉajka kun kurso pri literaturo kaj kulturo. La instruistoj havis la eblecon interŝanĝi spertojn per babilejo en Telegramo.

Ankaŭ la lernantoj havis sian propran telegram-grupon, kie ili esprimis siajn opiniojn, konatiĝis kaj interkomunikiĝis. Ankaŭ tie ĉiuj povis ricevi rapidan helpon, ĉar la teamo de E@I sendorme zorgis pri la platformo kaj pri la komforto de niaj lernantoj.

La geografio surprizis – ekde Kanado ĝis Koreio, diversaj horzonoj ne fariĝis malfacilaĵo. Ni fieras pri niaj lernantoj! Kelkaj el ili vekiĝis je la kvara matene por partopreni en la elektita kurso! La kursoj funkciis dufoje tage kaj paroligaj rondoj — eĉ trifoje. Sume okazis 42 horoj de paroligaj rondoj kaj 123 programeroj.

Dum SES okazis la unua virtuala SEP (Somera Esperanto-Programado) kun 35 aliĝintoj, kiuj havis eblecon senpage aliĝi ankaŭ al SES kaj plibonigi sian propran lingvonivelon. El la 218 aliĝintoj (183 SES-anoj kaj 35 SEP-anoj) registriĝis (eniris al la platformo) 188 homoj, kiuj post la sukcesa trapaso de la kursoj ricevis atestilojn.

Ne eblus okazigi tiun ĉi eventon sen kontribuo de esperantistoj. La E@I teamo kore dankas al ĉiuj program-kontribuantoj kaj al subtenantoj mon-donacintaj. Apartan dankon al ESF, kiu finance multe helpis okazigi ĉi-jaran eventon.

**Ĝi estas demonstra versio de la 123-paĝa aŭtuna *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**



## La Esperanto-urbo daŭre aktivas. Virtuale kaj reale

La pasinta somero en la Esperanto-urbo Herzberg am Harz ne estas komparebla kun la antaŭaj someroj. Distanco (pro la pandemio) estas la nova sorĉformulo. Homoj pensas alimaniere kaj zorgas unuavice por savi sin. Do, ni partoprenis la somerajn virtualajn eventojn, kaj faris en ili kelkajn fakajn prelegojn.

Por nia kerna teamo Esperanto estas la kutima ĉiutaga lingvo dum multaj jaroj. Gastoj plej ofte same uzas Esperanton, do ni vivas en konstanta Esperanto-medio. Malgraŭ la necerteco pri la enlanda kaj internacia trafiko ni decidis oferti ĉeestajn Esperanto-kursojn dum du semajnoj, eĉ se ne estis atendeblaj multaj partoprenantoj. Ekzemple, kelkaj aliĝintoj el Britio kaj Irlando ne venis pro vojaĝmalpermesoj. Estis bona decido oferti nian tempon kaj laboron al la kuraĝuloj. La kunestado, kunlernado bone plenumiĝis en la Esperanto-Centro kaj en ties ĝardeno. La kursanoj ĝuis la intensan lernadon, kiu enhavis ok lecionojn ĉiutage kaj konstantan lingvouzadon, ekzemple, dum komuna kuirado, dum la manĝoj, dum la duontagaj montaraj ekskursoj kaj en libera tempo.

Estis tre agrable kune festi en nia ĝardeno la 14-jaran jubileon de la Esperanto-urbo. Venis sufiĉe multaj gastoj kaj regis bona etoso. Al la programo apartenis



ankaŭ inaŭguro de dulingva informtabulo ĉe la parkloko de la proksima Rhume-fonto, kie nun jam ankaŭ en Esperanto oni povas legi informojn pri unu el la plej grandaj fontoj en Eŭropo.

Ĉi-somere danke al la longa kunlaboro de la Esperanto-Centro kaj la urba administrarejo aldoniĝis kelkaj novaj dulingvaj vojmontriloj, kiel “Rulsketejo”, “Juĝejo” kaj “Welf-kastelo”. Granda somera surprizo estas, ke en la subteraj trairejoj en nia stacidomo aperis grandaj dulingvaj reklamtabuloj “Bonvenon en la Esperanto-urbo” kaj “Willkommen in der Esperanto-Stadt”.

Ni uzis la someron ankaŭ por renovigado de la Esperanto-domo kaj plantado de heĝo en la Esperanto-ĝardeno. Pro la somera sekeco ĉiuvespere okazis akvumado. Tamen kelkaj plantoj ne travivis la someron kaj ni devis aĉeti novajn plantidojn.

Ĉiumardan posttagmezon ni havis kaj havas klubkunvenon. Foje partoprenis gastoj, ekzemple el Francio, Nederlando kaj Pollando, tiel ni povis krei internacian rondon. Internaciaj kontaktoj ekestis ankaŭ per uzado de Zoom, kiu ebligis al ni flegi kontaktojn kun niaj klubanoj kaj engaĝi novajn, virtualajn partoprenantojn. Interesa novaĵo estas, ke Esperanto-amiko planas fondi esperantlingvan ekologian vilaĝon en nia regiono. Diversaj junuloj interesiĝis pri tiu ideo, sed la plano ankoraŭ ne maturiĝis.

Ni daŭre flegas ankaŭ nian Esperanto-bibliotekon, kiu ricevis multajn librodonacojn el diversaj regionoj kaj nun estas unu el la plej grandaj Esperanto-librokolektoj. Kreskas ankaŭ la kolektaĵo de gazetoj. Laŭ nia scio el kelkaj kolektitaj materialoj ni havas la plej multon en la mondo, ekzemple, temas pri brajlaj libroj, turismaj broŝuroj, glumarkoj, medaloj kaj moneroj, bildkartoj ktp. Ankaŭ en la urba biblioteko troviĝas bretoj kun kelkmil esperantlingvaj libroj.

Unu el la someraj bedaŭrindaĵoj estis, ke la planita 15a junularinterŝanĝo kun nia pola ĝemelurbo Góra ne povis okazi pro la pandemio. Tamen la herzbergaj gejunuloj mem kudris maskojn kaj aldonis kelkajn donacojn al la pakaĵo, kiun ili sendis por la gelernantoj de Esperanto en Góra.

La somero jam pasis. Nun ni preparas novan ekspozicion pri firmaaj kaj produktomomaj en Esperanto por la Esperanto-ĉambreto en la kastela muzeo.

Por niaj laboroj ni bezonas volontulojn. Bonvolu informi nin, se vi konas honoroficajn helpantojn kaj translokiĝontojn, kiuj ne nur volas babili, komenti kaj kritiki en Esperanto, sed ankaŭ kontribui al la laboroj en la Esperanto-Centro. Estas granda bezono je helpo en la biblioteko kaj arkivo, por varbado, grafikado, organizado ktp. Tiam la publika projekto “Esperanto-urbo” florados kiel unika modelo en la mondo. Nur ĉe konstanta laborado Esperanto ekfloros en la realo, kaj ne nur dum virtualaj momentoj.

Se estas demandoj, bonvolu kontakti nin [esperanto-zentrum@web.de](mailto:esperanto-zentrum@web.de)  
Bonvenon en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo!

**Petro Zilvar**  
**Zsófia Kóródy**

## En kastelo kun maskoj

De la 3a ĝis 14a de aŭgusto 2020 en la Esperanto-Kulturdomo Greziljono (Francio) okazis maratona Esperanto-kurso kun Internacia Esperanto-Konferenco. Eble ĝi estus rutina okazaĵo, se ne temus pri unu el la unuaj internaciaj Esperanto-aranĝoj post la eksplodo de la koronavirusa pandemio. La organizantoj prenis la riskon de infektiĝo tute serioze kaj sekvis la preskribojn de la francaj leĝoj. El tio fontis kelkaj malfacilaĵoj, kaj ne temas nur pri la devigo surhavi maskon. Kelkaj mallarĝaj koridoroj ricevis unudirektan uz-permeson kaj sur la manĝejoj aperis strekoj kiuj indikis la spac-limigojn inter la partoprenantoj. En la klasĉambroj la kursanoj sidigadis dise, la paraj kaj grupaj ekzercoj okazis ekstere.

Pli grandan defion ol la esperantistoj kaŭzis la francoj, kiuj partoprenis en la paralela franclingva "Interŝanĝo de scioj kaj faroj". Ne ilia malobeemo al la reguloj, sed la multnombreco estis la defio. Dum dek tagoj la esperantista parto sekvis la kursojn de Jean-Luc Kristos kaj Paweł Fischer-Kotowski. En la finaj tagoj la franclingvaj *Interŝanĝantoj* forlasis la Kastelon, kaj iliajn lokojn okupis deko da pliaj esperantistoj, kiuj venis por la Internacia Esperanto-Konferenco – prelegaro per kiu Greziljono daŭrigas la tridekjaran tradicion de la fama OSIEK-aranĝo, kiu okazis en la jaroj 1989-2019. Inter la IEK-prelegoj elstaris la raporto de Ulrich Brandenburg pri la konflikto en orienta Ukrainio kaj la kontribuadoj de Renée Triolle. Multan atenton kaptis ankaŭ la diskuto pri COVID-19, gvidata de Rainer Kurz.

La ekzemplo de Greziljono pravas, ke malgraŭ la malfacilaj cirkonstancoj eblas daŭrigi la tradiciajn aranĝojn, se oni submetiĝas al la sanitaraj reguloj kaj la partoprenantaro ne estas tro granda. Notindas, ke la plej malfacila parto estas la vojaĝo, pro kio plej multaj el la kursanoj estis francoj. Espereble, la situacio baldaŭ renormaliĝos, ĉar la retaj aranĝoj estas nur surogato, per kiu ne eblas plene anstataŭigi niajn fizikajn renkontiĝojn.

**Paweł Fischer-Kotowski**







Foto: Gražvydas Jurgelevičius

## La ĵurnalista seminario okazis malgraŭ la pandemio

La 13a Seminario de esperantistoj-ĵurnalistoj en Litovio ankaŭ ĉi-jare kiel kutime devis okazi en majo. Tamen pro tiutempa pandemia kvaranteno en Litovio ĝi estis prokrastita, kaj ĝi tamen okazis la 19-20an de septembro en la tradicia bela apud-laga ripozejo de Aukštadvaris (distrikto de Trakai, proksime de Vilno). Per tio ĝi iĝis la sola reala, sed ne virtuala esperantista aranĝo dum la kongresa sezono ne nur en Baltio, sed en la tuta eksa Sovetunio.

La ĉefaj organizantoj de la seminario estis Esperanto-veterano, ĝenerala sekretario de Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio (TEĴA), prezidanto de Esperantista fako de Litovia ĵurnalista asocio Vytautas Šilas, kaj la eksprezidanto de TEĴA, prezidanto de Ŝtata komisiono pri la litova lingvo (kutime nomata “Litova lingva ministro”) Audrys Antanaitis.

Pro la ankoraŭ nefiniĝinta pandemio partoprenis malpli da homoj ol kutime, ĉirkaŭ 25 – ĉefe el Vilno kaj Kaŭno. Krom esperantistoj ĉeestis kelkaj ĵurnalistoj, kiuj interesiĝas pri Esperanto aŭ subtenas ĝin. La plej grava tiaspeca gasto estis la ĉefredaktorino de la novaĵretejo “Mano kraštas” (Mia lando) Genovaitė Paulikaitė, kun kiu Litova Esperanto-Asocio tre intense kaj efike kunlaboras. Dum la tuta jaro ni kune realigas intensan novan informan kaj instruan projekton pri Esperanto – en la speciala rubriko de ĉi tiu retejo aperis jam 102 (cent du!) artikoloj pri diversaj



aspektoj de Esperanto, intervjuoj kun dekoj da Litoviaj esperantistoj kaj 32 retaj lecionoj de Esperanto preparitaj de Gražina Opulskienė kaj Aida Čižikaitė. Inter la partoprenantoj eblis vidi ankaŭ la eksterordinaran ambasadorinon de Litovio esperantistinon Nijolė Žambaitė. La seminario pasis dulingve – litove kaj Esperante.

La programo estis intensa kaj interesa, bone interplektitaj estis la labora kaj ripoza partoj. Post la malfermo, prezentiĝoj de la partoprenantoj kaj tagmanĝo ni aŭskultis interesan prelegon de Genovaitė Paulikaitė “Kiel krei retan novaĵportalon?” Post kafopaŭzo sekvis alloga prelego de Dalia Pileckienė “Kiel eduki gvidantojn?” La prezidanto de Litova Esperanto-Asocio Povilas Jegorovas skizis la aktualan staton de Esperanto en Litovio kaj rakontis pri proksima estonteco.

La esperantistan kvizon gvidis verkisto kaj ĵurnalisto, posedanto de la eldonejo *Trys žvaigždutės* Jeronimas Laucius kaj Vytautas Šilas. Inter la programeroj kaj vespere eblis sporti, uzi banejon, promeni per boato sur la lago, ripozi en la naturo, kaj post la fino de la laborprogramo kanti ĉe lignofajro.

Dimanĉe post la matenmanĝo okazis aktiviga ludo en Esperanto, kiun gvidis Dalia Pileckienė kaj prelego-ludo de Jeronimas Laucius. Tagmeze la seminario estis fermita. Ĉiuj partoprenantoj restis kontentaj kaj unuanime opiniis, ke la tradicio daŭru kaj la seminario denove okazu en la sekva jaro.

**Povilas Jegorovas**

## **La Zamenhofa ekspozicio plu migras tra Litovio**

Ekde aŭgusto 2017 ekspozicio pri la vivo kaj agado de Ludoviko Zamenhof, preparita de Pola insitudo en Vilno kunlabore kun Litova Esperanto-Asocio (LEA) okaze de la centa mortodato de Zamenhof, jam sukcesis esti ekspoziciita en 22 lokoj de Litovio. Ĝi konsistas el 22 grandformataj standoj kaj detale prezentas la vivon kaj agadon de Zamenhof kaj Esperanton. Kvar standoj estas dediĉitaj al Esperanto en Litovio.

Ĉi-jare la ekspozicio estis aranĝita en la kulturcentro de Trakai, en la publika biblioteko de Kaišiadorys, en la publika biblioteko de Jurbarkas, en la publika biblioteko de Tauragė kaj en la publika biblioteko de Šilalė. En oktobro ĝi iros al la kulturcentro de Šakiai kaj pluen tra Litovio. Pro la pandemio dum tri monatoj la ekspoziciado ne povis okazi.

La ekspozicion en ĉiu urbo kaj distrikto akompanas ampleksaj artikoloj pri Zamenhof, pri Esperanto, pri la agado de LEA, pri famaj homoj kaj Esperanto k. s. en lokaj ĵurnaloj, en urbaj/distriktaj retejoj kaj en la retejoj de tiuj instancoj, kie okazas la ekspozicio. Danke al tio pri Esperanto ekscias vasta loka publiko, ne nur la vizitantoj de la ekspozicio.

Laŭplane la ekspozicio devas esti montrita en ĉiuj grandaj urboj de Litovio, inkluzive de ĉiuj distriktaj centroj, entute en pli ol 60 lokoj. Tio daŭros pli ol kvin jarojn.

**Povilas Jegorovas**

## Esperanto-kurso ĉe la universitato de Nanchang

Pro la pandemio ekde la 17a de februaro ĝis la 7a de majo, la revendato de studentoj al la universitato, pli ol 3000 kursoj ĉe la universitato de Nanchang (sud-orienta Ĉinio) funkciis en la retaj klasoj, inter ili ankaŭ mia kurso “Esperanto kaj internacia komunikado”, kiun ĉeestis 53 studentoj.

Por glatigi la retan lekciadon mi kunligis du rimedojn: QQ-tujmesaĝilon kaj la edukan platformon de nia universitato; la studentoj povas elekti iun el ili por aŭskulti kaj spekti prezentaĵojn laŭ sia ret-rapideco aŭ plaĉo.

Mi kundividis mian komputilan ekranon al la konversacia grupo ĉe QQ-tujmesaĝilo, kaj la studentoj povis samtempe vidi mian projekciaĵon kaj aŭdi mian voĉon; ni ankaŭ povis vidi nin reciproke per kamerao, se necesas. Pli avantaĝe ol la reala lekcio, ĉar krom la interparoli, mi povas vidi la respondojn de studentoj en la konversacia fenestro. Rimarkinte erarojn en la respondoj, mi povis tuj atentigi ilin.

Kiel la nomo de la kurso sugestas, mi instruas ne nur la lingvon, sed ankaŭ sciojn pri ĝia rolo en internacia komunikado. Mi konigis al ili Esperanto-organizaĵojn, kongresojn, literaturon kaj turismon, tiu lasta estis la plej ŝatata de studentoj. Mi dividis mian sperton pri vizpetado, ellaborado de itineroj, mendado de loĝado, biletoj ktp.

Por montri la internacian komunikadon, la 14an de majo mi invitis sinjorinon Fransoazo Oazo al mia reta kurso, miaj studentoj havis tre impresan tempon kun ŝi en Zoom. Ŝi unue montris fotojn de siaj familianoj kaj vilaĝo por paroligi ilin kaj poste tre bele ludis violonon. La studentoj admiris, dirante Esperante kaj ĉine: “Bone, belege...” Por ili ĝi estis unuafoja kontakto kun fremdlandano. Ankaŭ por Fransoazo Oazo ili estis ŝiaj unuaj ĉinaj gelernantoj.



Ekde la 7a de majo, kiam la studentoj revenis al la universitato, dum du semajnoj nur malgrandaj kursoj rajtis esti en klasĉambroj. Kiam post du semajnoj ni finfine revenis al la klasĉambro, sed estas la lasta leciono. Venis 44 el la 53 studentoj. Kelkaj ankoraŭ ne revenis al la universitato. La 4an de junio ĉiuj partoprenis la finan ekzamenon kaj sukcese trapasis ĝin. Huang Yinbao (Trezoro) donacis al miaj studentoj sian libron *La tagoj de mia volontula laboro en la Centra Oficejo de UEA*.

La Esperanto-instruado komenciĝis en la universitato de Nanchang en 2004. Pro mia propra kaŭzo la instruado paŭzis dum 2010-16, sed mi daŭre instruis Esperanton al interesitaj studentoj dum postleciona tempo. En 2011 fondiĝis Esperanta Asocio por studentoj en nia universitato, kie mi ofte instruas nian lingvon al la membroj. Sed tiu postleciona instruado ne estis bona solvo, ĉar la universitato ne povis doni poentojn al la studentoj, nek salajron al mi. Finfine, mi sendis peton pri malfermo de Esperanto kun detala instruplano, kaj en 2017 Esperanto estis refoje oficiale akceptita kiel unu el la kursoj elekteblaj libere en nia universitato.

Nun finiĝis la semestro, en la venonta semestro daŭre funkcios nia Esperanto-kurso, jam 41 studentoj aliĝis al ĝi.

**Gong Xiaofeng (Arko)**

## **La KCE-Komitato kunvenis pri 2021**

La Komitato de Kultura Centro Esperantista en Ĉaŭdefono (Svislando) fizike kunvenis en pleno la 5an de aŭgusto sub la tagprezido de Marie-France Conde Rey. Estis ekzamenitaj du proponoj pri eksteraj rilatoj: kun nacia institucio pri literatura traduko kaj kun reto de kulturaj societoj en la neŭŝatela kantono; ambaŭ proponoj estis unuanime aprobitaj. Male estis prokrastita la pritrakto de propono aliĝi al svisa reto de lingvolernejoj, ĉar ĝi bezonas profundigon.

Ekzamenante la perspektivon por la mandato 2021-23, la Komitato konstatis la anoncon de retiriĝo de d-rino Martinelli el la prezida posteno. Tamen ĉiuj nunaj komitatanoj, inkluzive ŝin, konfirmis la intencon rekandidatiĝi por la plenuma instanco. La Asembleo estos kunvokita en printempo 2021.

Por la programo 2021 estis aprobitaj la produktado de dek du numeroj de *Heroldo de Esperanto* kaj la organizado de kvar aranĝoj. La Komitato aprobis proponon rilate al la Asocio de LingvoTestistoj en Eŭropo, konfidante al Bellotti la esploron pri ĝia realigeblo.

**Ĝi estas demonstra versio de la 123-paĝa aŭtuna *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# Tribuno



Pro la drasta kresko de la koronaviruso (jam 30 mil infekto-kazoj por unu miliono da loĝantoj) Israelo iĝis la unua lando en la mondo, kiu reenkondukis kvarantenan reĝimon en septembro. Speciale por *La Ondo* la israela sciencisto kaj esperantisto Amri Wandel verkis analizan artikolon pri la stato de COVID-19 en Israelo. (Foto: Reuters / Amir Cohen)




# Israelo: la plej infektita lando tutmonde, sed ankaŭ la plej resaniĝa



## Eseo de Amri Wandel

### La monda situacio

Duonjaron post kiam la koronaviruso estis proklamita kiel pandemio, fine de septembro 2020 multaj landoj spertas la duan ondon, pli severan ol la unua. La tutmonda nombro de mortintoj ĵus atingis la simbolan valoron de unu miliono, kaj tiu de konfirmitaj infektitoj (“kazoj” en la profesia terminaro, kio inkludas ĉiujn konfirmitajn infektitojn de la viruso, ĉu malsaniĝintoj ĉu sensimptomaj) jam superas 30 milionojn. Laŭ la monda sanasocio (WHO) estas 10-20-oble pli da neidentigitaj infektitoj tutmonde, nome, ĉ. 10% de la monda loĝantaro estis infektita.



Kredeble ankaŭ la nombro de mortoj estas signife pli granda ol tiu de la registritaj mortintoj pro la viruso, ĉar multaj, aparte en la tria mondo, mortas de Kovid19 sen esti testitaj kaj identigitaj. Komparante la nombron de la forpasoj al tiu de la sama tempo en la pasinta jaro, oni konkludis ke verŝajne la nombro da mortintoj pro la viruso estas ĉ. 50% pli granda ol la registrita nombro.

Bildo 1. Takso de neidentigitaj infektitoj tutmonde, laŭ serologiaj testoj kaj aliaj parametroj, laŭ kiu ĉ. 10% de la homaro estis infektita de la koronaviruso (*The Economist*, 26.09.2020).

Ĝi estas demonstra versio de la 123-paĝa aŭtuna *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

# *Lukto por egaleco, aŭ Bombonoj kaj mono*

**de Stanislav Belov**



La 9an de septembro la usona Akademio de Kinaj Artoj kaj Sciencoj aldonis pliajn postulojn al ricevontoj de sia premio pro la plej bona filmo. Tio kaŭzis lavangon da kritiko unuflanke kaj subtenajn reagojn aliflanke. La evento mem apenaŭ estas rimarkinda, sed ĝia ekzemplo ebligas klare kompreni, kial la nuna lukto por egaleco kaŭzas tiom da bruo, sed apenaŭ montras realajn rezultojn.

## **Oskar-ludoj**

Mi memorigu, ke ekde 2024 por ricevi premion por la plej bona filmo necesos plenumi almenaŭ du el la kvar postuloj, rilataj al la reprezentado de tri malplimultoĵ – nigruĵoj, GLAT-uloj kaj virinoj:

- inter la ĉefaj aktoroj aŭ temoj de la filmo devas esti almenaŭ unu reprezentanto de tiuj grupoj;
- inter la anoj de la filma skipo devas esti homoj el almenaŭ du malplimultoĵoj;
- reprezentantoj de la menciitaj grupoj devas havi la eblecon trapasi lernopraktikon en la studio;
- ili devas esti prezentitaj en la filmstudia estraro.

La novaĵo atendeble estigis grumbladon de konservativismoj kaj jubladon de la liberaluloj. Mi komprenas ambaŭ, sed mi reprezentas la trian vidpunkton – mi simple fajfas pri tio. Ne pro tio, ke mi estas indiferenta al la sorto de la menciitaj malplimultoĵoj, sed pro pure praktikaj konsideroj – mi scias, ke tio ŝanĝos nenion.

Eĉ la filmstudioj mem apenaŭ bezonas ŝanĝi ion – en la nuna Usono malfacilas fari filmon sen uzi almenaŭ unu virinon kaj nigruĵon inter la aktoroj kaj skipanoj, kaj ili delonge estas reprezentitaj inter la praktikantoj kaj estraranoj. Fakte temas pri nura bela mangesto direktita al la indigna amaso, postulanta estimon kaj egalecon. Sed ĉu tiu dolĉa bombono vere kontentigos la usonajn nigruĵojn, kiuj jam kelkajn



monatojn amase manifestacias kaj tumulas sur stratoj de usonaj urboj? Necesas esti tro memfida kaj certa pri supereco de la blankula intelekto kaj subnivelo de tiu nigrula por esperi, ke la afrikusonanoj lasos sin trompi per tiu ĉi “venko”.

Vidi sian samgentanon sur ekrano estas agrabla afero, sed apenaŭ nova kaj neniel rilata al vera pliboniĝo de la vivo. Denzel Washington aktoras jam 43 jarojn kaj havas du Oskar-premiojn, sed tio ne helpis al George Floyd, kiam policisto faligis lin surteren kaj premis lian kolon per genuo. Kial? Ĉar la policano sciis, ke tiu estas nur nigrulo, do plej verŝajne homo malriĉa, eble ligita al krimaj aferoj kaj certe ne kapabla dungi multekostan advokaton por defendi siajn rajtojn. Li murdis ne nigrulon, li murdis malriĉulon, reprezentanton de malsupra socia grupo – kaj tio estas kerno de la afero. Se ni deziras preventi pliajn murdojn kaj tumultojn kiel neeviteblan reagon al ili, ni devas forgesi pri tiaj hipokritaj ludoj kaj kompreni, kie vere kuŝas la problemo.

Por trovi respondon sufiĉas spekti novaĵojn en usonaj televidkanaloj – eĉ se vi ne konas la anglan (tio povas esti avantaĝo). Kion ni vidas? Surstrate manifestacias kaj tumultas miloj da homoj, inter kiuj abundas reprezentantoj de ĉiuj rasoj kaj seksoj. Ankaŭ la disrabadon de vendejoj partoprenas pluraj blankuloj kaj certe plejmulto el ili estas ne virinoj.

Mi diru klare: la okazaĵoj en Usono estas protesto ne rasa, sed socia. Esperu solvi ĝin per disdonado de orumitaj statuetoj estas same stulte kiel kuraci kanceron per vitaminoj. Por konvinkiĝi je tio mi proponas por momento forlasi la ruĝan Oskar-tapiŝon kaj promeni inter statistikaj datumoj. Kредu, ili estas ne malpli ŝokaj ol la pompa ŝiko de la mondfama ceremonio.

## **Malegaleco - de la starto ĝis la fino**

Ni kutimas kredi, ke la usona socio faris grandan progreson ekde la 1960aj jaroj rilate al la homaj rajtoj, civilaj liberecoj kaj rasa egaleco. Kritikantoj de la nunaj tumultoj ŝatas referenci al la pacaj instruoj de Martin Luther King, preferante forgesi ke la blankula Usono respondis al tio per pafoj, murdinte lin kaj plurajn liajn sekvantojn.

**Ĝi estas demonstra versio de la 123-paĝa aŭtuna *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# Arkivo



En la festa programo, aranĝita okaze de la 160a naskiĝdatreveno de Aleksandras Dambrasukas en la urbeto Pagiriai, ne povis manki stando, dediĉita al lia esperantista agado, vd. p. 68.



# Jubileoj kaj memordatoj en oktobro 2020

3. Antaŭ 165 jaroj naskiĝis **Louis de Beaufront** (Louis Eugène Albert Chevreux, 1855-1888-1935), franca instruisto, esperantisto kaj idisto, nomita “la dua patro de Esperanto” pro la sukcesa disvastigo de Esperanto; fondinto (1898) de la asocio SPPE (poste: SFPE) kaj ties organo *L’Espérantiste*, reprezentanto de Zamenhof ĉe Hachette (1901-03), aŭtoro de pluraj lerniloj kaj prilingvaj libroj, inkluzive de la unua vera gramatiko de Esperanto *Commentaire sur la Grammaire de la Langue Internationale Esperanto* (1900); kompilinto de la antologio *Esperantaj prozaĵoj* (1902); en 1908 forlasis Esperanton kaj aliĝis al Ido.

Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegare*, p. 30-31.

4. Antaŭ 40 jaroj mortis **Eŭgeno Aisberg** (ruse: Евгений Давыдович Айсберг, france: Eugène Aisberg. 1905-1919-1980), ruslanda, sovetunia kaj franca inĝeniero kaj redaktoro (prezidanto de Internacia Unio de Radioteknika kaj Elektronika Gazetaro), kaj esperantisto; kunfondinto de *Internacia Radio-Revuo* (1925), en kiu aperis lia artikolaro *La babiladoj pri radio* (1926), poste diskoniĝinta libroforme kiel *Fine! Nun mi komprenas la radion!*, kiu estas unu el plej multe tradukitaj libroj, verkitaj en Esperanto (pli ol 20 lingvaj versioj, inkluzive de la franca, kiu aperis en 29 eldonoj); honora membro de UEA (1980).

Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegare*, p. 11-12.

5. Antaŭ 90 jaroj naskiĝis **Reinhardt Selten** (1930-1947-2016), Esperanto-aktivulo en Frankfurto, dumviva membro de UEA (1969), fonda membro (1983) kaj honora senatano de AIS, rektoro de la Internacia Kongresa Universitato en UK-84 (Berlino, 1999); aŭtoro de *Enkonduko en la teorion de lingvaj ludoj: Ĉu mi lernu Esperanton?* (Kun J. Pool, 1982, 2a eld. 1995) kaj *Por dulingveco en Eŭropo: Argumentoj kaj dokumentoj* (Kun H. Frank, 2005); redaktoro de la studkolekto *La kostoj de la eŭropa lingva (ne)komunikado* (1997), aperinta ankaŭ en nacilingvaj versioj; ĉefkandidato de la germana sekcio de EDE en eŭropaj elektoj en 2009, membro de la Honora Patrona Komitato de UEA (1995).

12. Antaŭ 70 jaroj naskiĝis **Ulrich Brandenburg** (1950- ), germana diplomato kaj denaska esperantisto, prezidanto de Germana Esperanto-Junularo (1974-76), redaktoro de *Pozitive* (junulara rubriko en *Germana Esperanto-Revuo*), prezidanto de Germana Esperanto-Asocio (2017- ), membro de la Honora Patrona Komitato de UEA (2010), patro de du denaskaj esperantistoj.

16. Antaŭ 60 jaroj mortis **Valdemar Langlet** (Lanlé, 1872-1890-1960), sveda ĵurnalisto, diplomato kaj esperantisto, ricevinta kun sia dua edzino Nina la honoran titolon “La justulo de la mondo” pro savado de judoj el la nazia persekutado en Budapeŝto (1944-45), kunfondinto kaj la unua eldonanto (1895-97) de la gazeto *Lingvo Internacia*, organizinto kaj realiginto (kun E. Etzel) de la unua internacia vojaĝo per Esperanto (Finnlando, Ruslando, Rumanio, Aŭstrio-Hungario, Germanio), kunfondinto kaj la unua prezidanto (1896-1909) de Sveda Esperantista Societo, aŭtoro de *Esperanto ett korrespondens- och turistspråk* (1896) kaj *Kanto al la fago de paco* (Kun muziknotoj de C. Adelsköld, 1897).

Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegare*, p. 165-166.

17. Antaŭ 15 jaroj mortis **Bakin** (pseŭdonimo de Li Yaotang, alinome Li Feigan 1904-1921-2005), ĉina verkisto, socia kaj ŝtata aganto (vicprezidanto de Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, prezidanto de Ĉina Verkista Asocio, prezidanto de Ĉina PEN-Klubo k. a.) kaj esperantisto; vicprezidanto (1980-86), prezidanto (1986-89) kaj honora prezidanto (1990) de ĈEL; kunfondinto de la societo Amikoj de Esperanto (1981); tradukinto de kvar Esperantaj libroj en la ĉinan: Akita Uĵaku. *Danco de skeletoj* (laŭ la traduko de Ŝuzui Hajime, 1930), E. de Amicis. *La floro de l' pasinto* (laŭ la traduko de R. Junck, 1930), A. N. Tolstoj. *La morto de Danton* (laŭ la traduko de N. Hohlov, 1931); J. Baghy. *Printempo en la aŭtuno* (1932). Aperis Esperantaj tradukoj de tri liaj libroj: *Aŭtuno en la printempo* (1980), *Frosta nokto* (1990), *La familio* (1999). Membro de la Honora Patrona Komitato de UEA (1981).

Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro*, p. 20-22.

21. Antaŭ 80 jaroj mortis **Eduard Stettler** (Ŝtétler, 1880-1908-1940), svisa juristo, socia aktivulo kaj esperantisto; prezidanto de SES (1911-13, 1927-32), vicdirektoro (1910-19) kaj direktoro (1919-20) de UEA, prezidanto de UEA (1920-24, 1928-34), ĉefaŭtoro de du statutoj de UEA (1920, 1934); aŭtoro de libro pri H. Hodler (1928), en kiu estas prezentita la frua historio de UEA, kaj de pluraj artikoloj, precipe en la revuo *Esperanto*.

Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro*, p. 266-267.

23. Antaŭ 75 jaroj naskiĝis **Claude Nourmont** (1945-1963- ), franca instruistino kaj esperantistino, ekde 1976 loĝanta en Luksemburgio, prezidanto de TEJO (1975-77) kaj ĝia honora prezidanto (1978), prezidanto de Unuiĝo Franca por Esperanto (1994-2001), vicprezidanto de UEA (2004-13), prezidanto de LKK de la 83a UK (Montpeliero, 1998), redaktoro de *Le Monde de l'espéranto* (2003- ), redaktoro pri arto de *Monato* (2005- ), kunlaboranto de *La Ondo de Esperanto*.

29. Antaŭ 60 jaroj mortis **Giorgio Canuto** (1897-1925-1960), itala medicinisto, fakulo pri jura medicino, universitata instruisto (rektoro de Parma Universitato, 1950-56) kaj esperantisto; vicprezidanto (1928-36) kaj prezidanto (de 1938 ĝis la baldaŭa malvigliĝo, 1950-60) de Itala Esperanto-Federacio; prezidanto de UEA (1956-60), vicprezidanto de LKK k rektoro de ISU en la 27a UK (Romo, 1935), membro de la Akademio de Esperanto (1953-60); post lia forpaso laŭ propono de Lapenna ĉe UEA estis kreita Fondaĵo Canuto, kiu ebligas membrecon al esperantistoj el nepagipovaj landoj.

Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro*, p. 54-55.

31. Antaŭ 145 jaroj naskiĝis **Lev Zamenhof** (Лев Маркович Заменгоф, 1875-1998-1934), ruslanda, poste pollanda, juda kuracisto kaj esperantisto, frato de Ludoviko Zamenhof, konata en Esperanto kiel Leono Zamenhof; redaktoro de *Pola Esperantisto* (1908-1913), membro de la Lingva Komitato (1925-34); tradukinto de *Aspazio* de A. Świątochowski (1908), *Protesilas kaj Laodamia* de S. Wyspiański (1908), *Ave Patria, morituri te salutant...* (1909) kaj *El la konstituciaj Tagoj* (1910) de W. Rejmont, kaj de poemoj de kelkaj polaj poetoj en la kolekto *Mia Liro* (1909), kiu enhavas ankaŭ liajn originalajn poemojn.

**Aleksander Korĵenkov**

## Jubileo de Aleksandras Dambrauskas

La 8an de septembro en Litovio estis festata la 160a naskiĝdatreveno de la ĉefa personeco de la Litovia Esperanto-movado Aleksandras Dambrauskas (1860-1938), konata ankaŭ laŭ sia pseŭdonimo Adomas Jakŝtas. Li estis unu el la ĉefaj eminentuloj de sia tempo en Litovio – romkatolika prelato, filozofo, teologo, poeto, literaturkritikisto, matematikisto, sciencisto, historiisto, redaktoro, socia aganto, esperantisto, terminologo, poligloto, resume: tre multifaceta kaj talenta homo. En ĉiuj terenoj li postlasis multajn verkojn kaj atingojn kaj ĝenerale tre valoran hered-aĵon. Liaj meritoj en la Litovia Esperanto-movado estas multaj:

1. La plej frua esperantisto en Litovio;
2. La aŭtoro de la unua Esperanto-lernolibro por litovoj (1890);
3. La fondinto de la unua Esperanto-societo de Kaŭno (1909);
4. Kunfondinto kaj la unua prezidanto de Litova Esperanto-Asocio (1919-28), poste honora prezidanto;
5. La unua redaktoro de la revuo *Litova stelo* (1922-26);
6. Aŭtoro kaj kompilinto de pluraj literaturaj kaj sciencaj libroj en Esperanto;
7. Membro de la Lingva komitato (1905-1936) kaj de la Akademio de Esperanto (1923-29);
8. La verkinto de la unua biografia skizo pri Zamenhof en la litova lingvo;
9. Prezidanto de la unua Ruslanda esperantista societo *Espero* en Sankt-Peterburgo (1903-05).

Sed tio, kompreneble, ne estas ĉio.

Litova Esperanto-Asocio (LEA) lerte eluzis la datrevenon de nia eminentulo por amase informi pri li kaj lia esperantista agado. Ampleksa artikolo pri li kaj lia esperantista agado, verkita de la nuna prezidanto de LEA kaj abunde ilustrita per fotoj, aperis en kvar tutlandaj paperaj gazetoj kaj en 11 novaĵretejoj.

La 13an de septembro 2020 la komunumo de la urbeto Pagiriai (distrikto de Kėdainiai) okazigis festan aranĝon omaĝe al Dambrauskas-Jakŝtas kun speciala atento al lia esperantisteco.

La festo komenciĝis per sankta meso omaĝe al li en loka romkatolika preĝejo. Sekvis deklamado de liaj versoj ĉe lianoma memorŝtono. En la ĉefa salono de la urba multifunkcia centro (kulturdomo) sekvis rakontado pri liaj rilatoj kaj kunlaboro kun aliaj tiutempaj litovaj eminentuloj kaj spektaklo de la Kaŭnaj geaktoroj Petras Venslovas kaj Olita Dautartaitė. Sekvis surpodia konversacio kun la prezidanto de LEA Povilas Jegorovas pri Aleksandras Dambrauskas kaj Esperanto.

La feston finis koncerto en Esperanto de la familia estrada ensemble “Sepa kaj Asorti” el la urbo Visaginas.

La feston partoprenis centoj da lokaj loĝantoj kaj kelkaj ĵurnalistoj. La prezidanto de LEA estis intervjuita por la televido de Kėdainiai.

**Povilas Jegorovas**

# Kulturo



*La majstro kaj Margarita* de Miĥail Bulgakov en siaj 33 nelongaj ĉapitroj kunprezentas du ĉefajn agadejojn: la Moskvon, kia ĝi estis komence de la jaroj 1930aj; kaj la Judujon en la tago de la ekzekuto de Jeŝuo Ha-Nocri, en kiu oni rekonas Jesuon Kriston. Antaŭ la leganto disvolviĝas tri historioj: la decido kaj la sekvoj de la decido de Poncio Pilato; la inkognita veno de Satano en Moskvon kun sia diable bunta sekvantaro; kaj la amafero inter la majstro kaj Margarita.

Kiel konvenas al majstroverko, *La majstro kaj Margarita* estas ankaŭ romano pri romano, pri literaturistoj kaj pri verkado mem. Kaj, evidente, ne nur pri tio.



# *La majstro kaj Margarita*

**Romano de Miĥail Bulgakov**

... Nu, kiu estas vi?

— De l' fort' mi estas ono  
Malbonvolema ĉiam, sed kaŭzant' de bono.  
«Faŭsto»<sup>1</sup>

## Parto Unua

### Ĉapitro 1

#### **Neniam interparolu kun nekonato**

Foje en Moskvo, dum malnormale varmega printempa sunsubiro, du civitanoj venis la ĝardenplacon de la Patriarĥa lageto<sup>2</sup>. La unua, vestita per griza somera kompleto, estis malalta, diketa, kalva, sian malfrivolan ĉapelon li portis en la mano, kaj sur lia bone razita vizaĝo vastis kolosaj okulvitroj en nigra korna muntumo. La dua, larĝaŝultra juna viro kun senorda rufeta hararo kaj kvadratita kaskedo sur la nuko, surhavis buntan ĉemizon, ĉifitan blankan pantalonon kaj nigrajn sportoŝuojn.

La unua estis neniu alia ol Miĥaelo Aleksandroviĉ Berliozo<sup>3</sup>, redaktoro de dika beletra revuo kaj la prezidanto de *Massolit*<sup>4</sup>, unu el la plej grandaj moskvaj literaturasocioj. Lia akompananto estis la juna poeto Ivano Nikolaiĉ Ponirov', verkanta sub la pseŭdonimo Senhejmulo<sup>5</sup>.

Atinginte la ombron de apenaŭ verdiĝintaj tilioj, la literaturistoj tuj ĵetis sin al bunta budo kun surskribo *Biero kaj Trinkaĵoj*.

Nu, oni notu la unuan strangaĵon de tiu terura maja vespero. Ne nur antaŭ la budo, sed en la tuta aleo paralela al la Malgranda Bronnaja strato, ne estis eĉ unu homo. Je horo, kiam oni apenaŭ povis spiri la varmegan aeron, kiam la suno, ardiginte Moskvon, en seka nebulo estis falanta ien trans Sadovaja-strato, neniu venis sub la tiliojn, neniu sidiĝis sur benkon, malplena estis la aleo.

— Mi petas Narzanon<sup>6</sup>, — mendis Berliozo.

- Narzanon mi ne havas, — ial ofendiĝis la virino en la budo.
- Ĉu vi havas bieron? — raŭkvoĉe demandis Senhejmullo.
- Bieron mi ricevos vespere, — respondis la virino.
- Do kion vi havas? — demandis Berliofo.
- Abrikotakvon<sup>7</sup>, sed varmetan, — diris la virino.
- Nu, donu, donu, donu!..

La abrikotakvo eligis abundan flavan ŝaŭmon kaj la aero ekodoris je frizejo.

Sattrinkinte, la literaturistoj tuj komencis hiki, pagis kaj sidiĝis sur benkon vizaĝe al la lageto kaj dorse al la Malgranda Bronnaja strato.

Tiam okazis la dua strangaĵo, kiu koncernis nur la redaktoron. Subite li ĉesis hiki, lia koro saltis kaj por unu momento ien trafalis, poste revenis, sed kun malakra pinglo en ĝin enpikita. Krome, Berliofo eksentis senkaŭzan, sed tiel fortan teruron, ke li volis tuj forkuregi de la Patriarĥa.

Berliofo angore rigardis ĉirkaŭen, sen kompreni, kio lin timigis. Li paliĝis, viŝis la frunton per la poŝtuko, pensis: «Kio min trafis? Tio ja neniam okazis ... La koro stultumas ... Forlasu mi ĉion kaj veturu en Kislovocon!»

Kaj jen la varmega aero plidensiĝis antaŭ li kaj formis travideblan civitanon tre strange aspektantan: ĵokea kaskedo sur la malgranda kapo; kvadratita kaj tro mal-longa jaketo, same aera; dumetra staturto, sed la ŝultroj mallarĝaj; nekredeble mal-dika; kaj la mieno — bonvole atentu! — sarkasma.

La vivo de Berliofo evoluis tiel, ke li ne kutimiĝis al fenomenoj eksterordinaraj. Ankoraŭ pli paliĝinte, li malsprite rigardegis kaj konsternite pensis: «Tio ne estas ebla!..»

Sed tio ja estis, kaj la longa travidebla civitano pendolis antaŭ li dekstren kaj maldekstren sen tuŝi la teron.

La teruro tiom ekposedis la redaktoron, ke li fermis la okulojn. Kiam li ilin re-malfermis, li vidis, ke ĉio estas finita, la vizio aerdisiĝis, la kvadratita malaperis, kaj samtempe la malakra pinglo foriĝis el la koro.

— Ho, diablo! — ekkriis Berliofo. — Ĉu vi scias, Ivano, ĵus min preskaŭ trafis sunfrapo. Mi eĉ kvazaŭ haluciniĝis. — Li provis rideti, sed en liaj okuloj ankoraŭ flagris la angoro kaj liaj manoj tremis.

Iom post iom li tamen trankviliĝis, unu fojon sin ventumis per la poŝtuko, kaj brave dirinte: «Do, bone», li daŭrigis la parolon, interrompitan pro la trinkado de abrikotakvo.

Poste oni eksciis, ke ĝi temis pri Jesuo Kristo. La problemto estis jena. La redaktorito mendis al la poeto grandan kontraŭreligian poemon<sup>8</sup> por la sekva numero de la revuo. Tiu verkis la poemon, kaj eĉ tre rapide, sed bedaŭrinde ĝi neniom kontentigis la redaktoron. La ĉefan personon, Jesuon, la poeto pentris per tre malhelaj farboj, kaj tamen Berliofo opiniis, ke ĉio estas reverkenda. Nun li faris kvazaŭ prelegon pri Jesuo, por komprenigi al la poeto lian precipan eraron.

Malfacilas diri, kio fakte mishelpis Senhejmulon: ĉu la bildokrea forto de lia ta-

lento, ĉu la kompleta malkono de la temo, sed lia Jesuo estis perfekte viva, ja viva, iam ekzistunta Jesuo — kvankam cetere, havanta ĉiujn malvirtojn Jesuo.

Nu, Berlioza penis pravi al la poeto, ke gravas ne tio, *kia* estis Jesuo — ĉu bona aŭ malbona — sed la fakto, ke ĉi tiu kiel individuo tute ne ekzistis, kaj ke ĉiuj rakontoj pri li estas nur fikcio, ordinara mito.

Menciendas, ke la redaktoro estis erudiciulo, kaj tre lerte li referencis antikvajn historiistojn, ekzemple la faman Filonon el Aleksandrio, la kleregan Jozefon Flavion, kiuj eĉ per unu vorto ne menciis Jesuon. Evidentigante vastajn sciojn, li komunikis al la poeto, ke la loko en la libro dek kvina, ĉapitro kvardek kvara de la famaj *Analoj* de Tacito, kie temas pri la ekzekuto de Jesuo, certe estas posta falsa intermeto.

La poeto, por kiu ĉio rakontata de Berlioza estis novaĵo, atente aŭskultis, fiksigardante tiun per siaj viglaj verdaj okuloj, kaj nur malofte li hikis, duonvoĉe malbenante la flavan abrikotakvon.

— Ne estas eĉ unu orienta religio, — diris la redaktoro, — en kiu junulino, plej ofte virga, ne naskus dion. Kaj la kristanoj inventis nenion novan, same elpensinte sian Jesuon, kiu fakte neniam vivis. Jen kio estas precipe emfazenda ...

La alta tenoro de Berlioza sonoritis en la malplena aleo, kaj avancante en la labirinto, kien nur tre klera homo povas penetri sen la risko perdiĝi, li konigadis al la poeto pli kaj pli da interesaj kaj utilaj informoj pri la egipta Oziriso, bona dio kaj filo de la Ĉielo kaj de la Tero, pri la fenica dio Tamuzo, pri Marduko kaj eĉ pri la malpli konata timinda dio *Vicli-Pucli*<sup>9</sup>, kiun iam adoris la astekoj<sup>10</sup> en Meksikio.

Ĝuste kiam Berlioza rakontis al la poeto, kiel la astekoj modlis figurojn de *Vicli-Pucli* el la pasto, en la senhoma aleo aperis viro.

Poste, kiam verdire jam estis malfrue, pluraj organizoj prezentis siajn raportojn pri tiu homo. Maleblas sen miro kompari la raportojn. Ekzemple, la unua atestis, ke la homo estis malalta, ordenta, kaj lamis je la dekstra piedo. La dua, ke li estis altega, havis platenajn dentokronojn kaj lamis je la maldekstra piedo. La tria lakone informis, ke la homo havis nenian apartaĵon.

Oni devas konstati, ke ĉiuj ĉi raportoj estas fuŝaj.

Antaŭ ĉio, la priskribato tute ne lamis kaj estis nek malalta nek altega, sed simple alta. Koncerne la dentojn, maldekstre li havis platenajn dentokronojn kaj dekstre orajn. Li surhavis multekostan grizan vestokompleton, kun kiu kolore akordis liaj eksterlandaj ŝuoj. Sian grizan bereton li brave oblikvigis al la orelo, subbrake li portis promenbastoneton kun nigra tenilo en formo de pudela kapo<sup>11</sup>. Kvardekjara, laŭ la aspekto. Tordita buŝo. Bone razita. Nigrahara. La dekstra okulo: nigra, la maldekstra: ial verda. La brovoj: nigraj, kaj unu pli alta ol la alia.

Unuvorte, alilandano.

Pasinte preter la benko kie sidis la redaktoro kaj la poeto, li oblikve rigardetis ilin, haltis kaj subite eksidis sur la apudan benkon je du paŝoj de la amikoj.

«Germano ...», pensis Berlioza.

«Anglo ...», opiniis Senhejmulo. «Jen, ne varmegas al li surhavi la gantojn!»

Dume la alilandano rigardis ĉirkaŭen al la altaj domoj, kvadrata kadrantaj la ĝardenplacon; estis evidenta, ke la lokon li vidas unuafoje, kaj ke ĝi lin ekinteresis. Li fiksas la rigardon sur la supraj etaĝoj, kies vitroj blindige brile spegulis la rompitan sunon, por ĉiam forirantan de Berliozo; poste direktis ĝin malsupren, kie la vitroj komencis antaŭvesperece malheliĝi, ial ridetis indulge, duonfermis la okulojn, metis la manojn sur la bastonnettenilon kaj la mentonon sur la manojn.

— Vi, Ivano, — plu paroladis la redaktoro, — tre bone kaj satire prezentis, ekzemple, la naskiĝon de Jesuo la Dia filo, sed la interesaĵo ja estas, ke antaŭ Jesuo jam estis naskita tuta serio da diaj filoj, kiaj la fenica Adoniso, la Frigia Atiso, la persa Mitrao. Nu, resume, fakte naskiĝis neniu el ili, kaj neniu ekzistis, nek Jesuo, kaj endus ke vi, anstataŭ la naskon aŭ ekzemple la alvenon de la saĝuloj<sup>12</sup>, prezentu la absurdajn onidirojn pri tiu alveno. Ĉar laŭ via rakonto li tamen estus naskita!

Ĉi tiam Senhejmulo provis ĉesigi la turmentan hikadon retenante sian spiron, sekve de kio li ekhikis eĉ pli dolore kaj laŭte; kaj je la sama momento Berliozo interrompis sian parolon, ĉar la alilandano subite ekstaris kaj paŝis al la literaturistoj. Tiuj rigardis lin mirigite.

— Bonvolu min pardoni, — ekparolis la alveninto kun fremda prononco, sed sen kripligi la vortojn, — ke mi, ne estante konata, tamen min trudas... Sed la temo de via klera konversacio min tiom interesas, ke ... — Li ĝentile levis la bereton, devigante la amikojn duon-ekstari kaj responde kapoklini.

«Ne, probable franco», decidis Berliozo.

«Polo?» pensis Senhejmulo.

Menciendas, ke ekde siaj unuaj vortoj la alilandano tre malplaĉis al la poeto, dum la impresoj de Berliozo estis plie favora — nu, ne ĝuste favora, sed kiel mi diru? — al la redaktoro li ŝajnis kurioza, eble tiel.

— Permesu ke mi alsidiĝu<sup>13</sup>, — ĝentile petis la nekonato, kaj la amikoj iel nevole dismoviĝis, la alilandano lerte eksidis inter ilin kaj tuj reprenis la konversacion.

— Se mi ne misaŭdis, vi bonvolis diri, ke Jesuo neniam ekzistis, ĉu? — li demandis, turnante sian maldekstran, verdan okulon al Berliozo.

— Vi ne misaŭdis, — ĝentile respondis la redaktoro, — ĝuste tion mi diris.

— Aĥ, kiel interese! — ekkriis la alilandano.

«Pro la diablo, kion li volas?» pensis Senhejmulo kaj kuntiris la brovojn.

— Kaj vi, ĉu vi konsentis kun via interparolanto? — la nekonato sin turnis dekstren al Senhejmulo.

**Ĝi estas demonstra versio de la 123-paĝa aŭtuna *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**



# *Patrino letero*

**de Ewa Grochowska**



Du semajnojn post la forpaso de la patrino, mia fratino, Floriano (ŝia tria edzo) kaj mi denove renkontiĝis en la domo de niaj gepatroj. Ni mole sidis sur la eluzita sofo kun glasoj da alkoholaĵo enmane. Malgajaj, ni silentis longajn minutojn. Mi glitrigarde observis la meblojn, la paliĝintajn papertapetojn, la ekzotajn ornamaĵojn, kva-zaŭ mi malkovrus unuafoje la universon de Panjo. Laodoro de malnovaj, polvozaj tukaĵoj ternigis Florianon. Tra la grandaj salonaperturoj videblis la ĝardeno. Nun, ĉirkaŭata de altegaj domoj, kies fenestroj ŝajnis spioni la najbarojn, ĝi perdis sian antaŭan, intiman ĉarmon. Nur la olda pomarbo kun florplenaj branĉoj estis tiel bela, kiel en la tempo de nia infanaĝo.

Mia fratino kaj mi, instalitaj de multaj jaroj eksterlande, plezure gastigis nian patrinojn ĉe ni, sed malofte ni revenis hejmen. La patrino bonege mastrumis sian ĉiutagan vivon. Aĝa je naŭdek jaroj, forprenita de pulma embolio apenaŭ kelkajn tagojn post la diagnozo, ŝi mallonge suferis.

La vilao kaj ĝia ĝardeno, la solaj riĉaĵoj, kiujn la gepatroj lasis al ni, estis plenaj de bonaj memoraĵoj. Tamen eĉ dum la ferioj, neniu el ni emis loĝi ĉi-tie. Do, antaŭ ol publikigi la anoncon pri la vendo, ni devis malplenigi la ĉambrojn. Ordigante la diversajn aĵojn, ni ekvidis malnovajn fotoalbumojn, kiuj atestis pri nia feliĉa familia vivo. Nia patro, marista oficiro ofte forestis, kaj ni atendis senpacience liajn revenojn. Kiam la patro ŝipvojaĝis profesie, niaj gepatroj regule korespondis. Ni retrovis iliajn flaviĝintajn leterojn, kortuŝan pruvon de la granda amo, kiu unuigis ilin. Tamen okazis en la vivo de nia patro periodo, pri kiu li neniam parolis. Ni nur sciis, ke en la jaro 1947, li iĝis memvola militisto en Hindoĉinio.

**Ĝi estas demonstra versio de la 123-paĝa aŭtuna *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# *Vojaĝo kun Hans Glas*

**de Sten Johansson**



En la jaro, kiam mi iĝis dektrijara, Hans Glas eniris mian vivon. Ĝi estis ruĝa kaj belega, laŭ Paĉjo.

“Ĉu bela?” diris Panjo. “Ĝi ja konsistas ĉefe el rusto. Se mi eniros, mi sendube truos la plankon.”

“Stultaĵo. Ĉi tia raraĵo maturiĝas kun gracio.”

“Kia marko estas?” mi demandis. “Aperas nur Glas sur la fronto.”

“Precize. Juvelo el 1964 de Hans Glas en Bavario.”

“Hans Glas? Neniu aŭto nomiĝas Hans Glas!”

“Jen ĝi, tuj antaŭ vi.”

Kaj Hans Glas restis ĝia nomo dum ni posedis ĝin. Tio ne daŭris longege, tamen el ĉiuj porsomeraj aŭtoj, kiujn Paĉjo aĉetis, tiun mi memoras plej bone. Eble ĉar ĝi iĝis nia lasta. Aŭ pro la maniero, kiel ĉio finiĝis.

Mi ne scias ĉu iu el ni vere volis refoje ferii en tendo. Panjo estis laca pro sia partia laboro ĉirkaŭ la unua de majo, kiam ŝi devis plurfoje semajne kunvenadi ĝis malfrue vespere. Mi preferus resti hejme kun la amikoj, kaj Jonas volis kuŝi surlite legante, kiel kutime.

“Bildstriojn vi povos legi en la tendo kaj aŭto”, diris Paĉjo.

Li pendolis inter entuziasmo kaj plena rezigno, foje eĉ en unu sama frazo.

“Ni devas uzi nian novan tendon, je kukolo! Ĝi estas vera palaco. Tamen, se vi ne volas... Mi faras ĉi tion por vi. Al mi mem sufiĉus zorgi pri la ĝardeno, kiu ja donas rekompencan. Kaj vi restu ĉe via partio, Sonja. Vi jam loĝas tie. Ŝajne vi tie ricevas ĉion bezonatan.”

**Ĝi estas demonstra versio de la 123-paĝa aŭtuna *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# *Du nomoj*

**de Paulo S. Viana**



Kiel vi trafis en ĉi tiun lokon, Gledson?

Ĉio komenciĝis kiam mi eksciis, ke mi havas du nomojn. Unuflanke de la patro, Gledson; aliaflanke de mia patrino, Antono. Ĉi tio kondamnas homon, faras lian vivon enigma, senkongrua, ŝvebanta inter tago kaj nokto, duboplena krepusko. Mi ne povus imagi, ke mia patro, kiun mi ne konis, malaperus en la mondon, tuj post mia unua beboploro. Li nenion diris, nenion lasis, krom gameto kaj nomo, Gledson. Kiel mi povus, estante ankorau tiel malmatura, forigi el mia esto tian nomon sonorant, flavecan, eĥantan nazalaĵojn?

Ĝis tiam mi estis Antono, kontenta en mia modesteco pri mia familia alnomo To. Ĉiu konis la knabon To, de Sinjorino Vera, adoptita filo vartita kiel se vera ido. Mia patrino neniam batis min pli ofte ol la idojn de sia ventro, eble eĉ malpli. Cetere, mi estis bonkondata, trankvila knabo, kies unusola misaĵo estis la malŝato frekventi lernejon. Ĉi tion mia patrino pardonis, ĉar sama estis la inklino de ŝiaventraj idoj, egale. Mi estis normala, mi rigardis, ke la mondo estas en ordo, ĉio en sia ĝusta loko, mi neniam vidis aŭ aŭdis ion, kio ne ekzistas.

Al mi plaĉis la stratfoiroj, ludado kun hundoj, aŭskultado de rakontoj fare de pli saĝaj knaboj, senŝua irado sub la pluvo, se ne estus fulmotondroj. (Nenio estas pli terura ol fulmotondro por skui la prudenton.) Al mi plaĉis ankaŭ lavi aŭtomobilojn por gajni moneron. Mi estis Antono, normala, stulteta knabo en la kvartalo.

Kiam mi kompletigis dek ok jarojn da vivo, jen reaperis mia patro, mi ne scias el kie. Li alvenis, frapis la pordon de mia patrino Vera, respektoplene.

– Kion vi deziras?

**Ĝi estas demonstra versio de la 123-paĝa aŭtuna *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# *Parludo*

**de Nicola Ruggiero**



*Amuze*

*Vi konas  
Betelĝuzon  
kaj Riĝelon,  
Algolon  
kaj  
Mirfakon,  
sed  
ne rekonas  
Orionon  
kaj  
Perseon.*

*Vi klare  
distingas  
arbojn  
laŭ folioj  
ĉiamverdo  
fruktoj  
sed forgesis  
pri l' arbaro.*

*Ĉu ruze  
vi nomas  
miajn larmojn  
bubaĵoj,  
miajn dezirojn  
kapricoj?*

# Oskaro – ne plu tiom blanka?

de Wolfgang Kirschstein



En 2020 la usona filmakademio kuraĝe decidis, ke ricevinto de Oskaro por la plej bona filmo de la jaro estu la korea filmo *Parazito* (legu pli en *La Ondo*, 2020, №303). La usona prezidento ne estis kontenta pri ĉi tiu decido kaj demandis antaŭ sia kriĉanta kaj samkompetenta anaro “Kio, diable, okazis?” kaj aldonis, ke io kiel *Forigita de la vento* (*Gone with the Wind*) estus inda kandidato en ĉi tiu kategorio.

Historio foje estas acide ironia, ĉar la ofertanto de la elsendofluoj HBO kelkajn monatojn poste, sendepende de la idiota prezidenta rimarko, portempe eliminis ĝuste la fimon *Forigita de la vento* el sia katalogo pro rasaj kliŝoj kaj mensoga prezento de historio. Kiam la 25an de majo blanka policano kvazaŭ en rekta elsendo forprenis la vivon de la nigra etkrimulo George Floyd, la movado “Nigraj Vivoj

Gravas” ne nur en Usono, sed ankaŭ en multaj aliaj landoj ekprotestis manifestacie kontraŭ evidentan kaj kaŝitan rasismon kaj ŝanĝis la tagordon. Ankaŭ Holivudo demandis sin, kiel ĝi multobligas rasajn kliŝojn kaj tial revenis la debato pri tiu klasikaĵo.

## Feliĉaj sklavo

*Forigita de la vento* de 1939 estas kompreneble infano de sia tempo, kiam politike absolute ne korektaj konceptoj pri aliaj homoj abundis. Senprobleme eblas trovi kruelajn amerikajn indiĝenojn aŭ malicajn ĉinojn. Ajna fremda akĉento, ĉu rusa, ĉu araba indikas krimemulojn. Foje ili estas ridindaj aŭ infanecaj, mallonge: homoj, kiuj ankoraŭ ne atingis la pinton de civilizacio (Holivudo intertempe tamen promociis ĉinojn, ĉar ili nun financas la produktaĵojn.)

En tiu senco la fono de *Forigita per la vento* estas laŭ la normo de sia tempo. Spite al sia propaganda mesaĝo ĝi estas elstara filmo kaj eĉ mejloŝtono en la historio de la kino.

Ĝia fono estas la usona intercivitana milito. Ni vidas la historion el la vidpunkto de juna ne speciale matura virino el la Sudo. Scarlett O’Hara dum preskaŭ kvar horoj, kiujn tiu filmo daŭras, neniam vere komprenas, kial la Nordo militas kontraŭ la Sudo. Laŭ ŝia kompreno la Nordo simple intencas detruigi la vivmanieron de la Sudo. La sklaveco ne estas tro malbona, ĉar la nigruloj ja ne povas zorgi pri si mem.





Butterfly McQueen ludis la rolon de la sklavino Prissy. “Kiam Butterfly McQueen aperis, mi emis rampi sub la tapiŝon”. (Malcolm X)

Abomenaĵoj ankaŭ ne ekzistas, male la sklavoj estas ege kontentaj. Jen estas Prissy (angle: ĝenema) aŭ Pork (angle: porkaĵo), kaj kompreneble la plumpa infanvar-tistino Mammy – entute karikaturoj. La filmo bagateligas la sklavecon. La aktorino de Mammy faris tiom grandan impreson, ke ŝi ricevis Oskaron pro sia laboro.

### **Laŭda escepto**

Tamen eĉ la 30aj jaroj montris, ke alternativoj eblas. En *Imito de la vivo* (*Imitation of Life*, 1934) ni trovas du virinojn, blankan kaj nigran, kiuj spite al ĉio venkas ĉiujn obstaklojn. Ili fariĝas komerce sukcesaj. Ambaŭ estas egalrajtaj. Ĉiutaga rasismo ekzistas en la mondo (uzo de kliŝo estas parto de ilia sukceso), sed ne inter ili. *Imito de la vivo* venis antaŭ sia tempo, kiel vizio de estonteco, kiu ankoraŭ ne alvenis.

### **Ho, kiom diversa!**

Ĝi estas demonstra versio de la 123-paĝa aŭtuna *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

En sia prezento de la februara almanako, kies aperon oni anoncis la 15an de majo, Jesper Lykke Jacobsen rakontas pri la dana infanlibro *Palle sola en la mondo*, verkita de Jens Sigsgaard (aperinta en 1942), kiu infanaĝe efikis al li traŭmatize. La fabelo asociiĝas ĉe Jacobsen kun la aktuala situacio en la mondo kaj revokis ĝin el la memoraĵfundo raportaĵoj pri la Vuhana koronaviruso: "... ni, la tuta homa raso, infane jam delonge kredas permesata al ni ĉion: sen konsidero pri la konsekvencoj ni per nia ĉiutaga agado (kaj neagado) puŝadas la sovaĝan naturon al la klifo de ekstermo".

La esperantistaj viktimoj de la koronaviruso, Júlia Sigmond kaj Sen Rodin, estas omaĝitaj per la aperigo de du poeziaĵoj de Júlia kaj librofragmento de Sen.

Du originalaj prozaĵoj venas el la plumo de Sten Johansson kaj Mikaelo Bronŝtejn. Poezie kontribuas Dimitrije Diso Janičić. Korespondo inter Probal Dasgupta kaj Mauro Nervi pri la poemaro *Havenoj* de Mauro Nervi, okazinta en 2002, antaŭas selekton da pluraj poemoj de Nervi.

Fragmentoj el *Metamorfozoj* (aŭ: *La ora azeno*), la plej fama verko de Apulejo, aperas en la traduko de Nicola Ruggiero. Traduka literaturo ĉeestas per verkoj de Miĥail Lermontov (*Demono mia*, trad. Evgenij Georgiev), Rainer Maria Rilke (*La Sonetoj al Orfeo*, trad. Mark Fettes), Robindronath Tagor (*Tempo kriza*, trad. Probal Daŝgupto).

Ulrich Lins rakontas pri la vojaĝoj de Edmond Privat al Usono, liaj renkontiĝoj kun la ŝtatprezidentoj kaj kion li lernis tie. Akompane estas publikigita unu el la usonaj ĉapitroj el la bone konata esearo de Privat *Aventuroj de pioniro*.

Kion kaj kiel oni rakontu al la ekstera publiko pri la Esperanta literaturo, meditas Probal Daŝgupto kaj donas ekzemplon per sia benlalingva libro *La polusoj preĝas: la ekvatoro respondas*, antaŭparolo al kiu aperas en la aŭtora Esperanta traduko.

Sub la titolo *Taglibro de kampara knabino* aperas fragmentoj el la taglibro de Signild Franzén verkita en Esperanto en 1942-43, ke la fratinoj ne povu kompreni, kion ŝi skribas. La eltiraĵojn kompilis Sten Johansson.

*La fino de la latina periodo* estas artikolo de Gerrit Berveling el la jaro 1988a, kiu temas ne nur pri la sorto de la latina literatura lingvo kaj la kresko de influo de la naciaj lingvoj en Eŭropo tra jarcentoj, sed ankaŭ pri la eduka revolucio en 1960-aj jaroj. En la *Postkonsidero* (2017) Berveling traktas la lernejan kaj universitatan sistemon en Nederlando kun aparta atento al lingvoj.



Miguel Fernández eseas pri la plej hispana poezia ĝenro – romanco – per la historia panoramo de la fino de la 14a jarcento ĝis la 20a, kaj pri tio, kiel estis pruvite, ke esperantigo de romancoj eblas, ilustrante per tradukoj far Fernando de Diego kaj per sia propra traduko de *Dekdua sur horloĝo*'.

Recenze al la 37a Boao kontribuas Jorge Camacho pri *Loĝi en homaj lingvoj: la substancisma perspektivo* de Probal Dasgupta, Mikaelo Bronŝtejn pri *Marina* de Sten Johansson, kaj Sten Johansson pri *Aspiroj. Kroniko de neanoncita murdo* de Lode Van de Velde. Eble utilus, por ne doni akuzon pri koterieco, inviti pli da recenzantoj el ekster medio de la kunlaborantoj de BA.

La koronavirusa epidemio menciigās plurloke en la almanako, ĝis la ciklo de 14 poem(et)oj de Jorge Camacho sub la komuna titolo *Virusaj versoj*, jen la 13a ero:

### Izoleco

*Ĉi-flanke de fenestro,  
en ombro aŭ sub sun',  
kiel izol-insulo  
atendanta finiĝon  
de la skurĝa tajfun'.*

Mi deziras al vi interesoplenan legadon!

**Halina Gorecka**

## **Kazohinio aperos en la franca lingvo**

Komisiite de la Librofako de LF-koop, Marie-France Conde Rey provlegis la francigon de *Vojaĝo al Kazohinio* de Sándor Szathmári, kiun elesperantigis Ulrich. La 30an de julio en la Esperanto-Domo en Ĉaŭdefono (Svislando) okazis la definitiva renkonto pri la revizio: laŭ Conde Rey la traduko estas elstara, tute digna por la eminenta romano.

Nia plej valora socia romano post la dua mondmilito estas la verko de eksterordinara viziulo: sufiĉas mencii la intuicion de Szathmári, laŭ kiu elegantuloj laŭmode surhavas pantalonojn ŝiritajn plurloke...

**Ĝi estas demonstra versio de la 123-paĝa aŭtuna *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# ESPERANTO ESTAS PLI OL LA MOVADO

De 40 jaroj MONATO raportas ne pri Esperanto sed en Esperanto pri la plej diversaj flankoj de la homa socio: politiko, scienco, ekonomio kaj ĉiaj temoj de la moderna vivo. MONATO estas plenkolora kvalitmagazino por postulemaj legantoj, kiuj volas esti funde informitaj.



## Jen kelkaj bonaj kialoj por aboni ĝin nun:

- Nun novaj abonantoj ricevos MONATON dum tri monatoj senpage.
- Por MONATO raportas ne eksterlandaj ĵurnalistoj, sed lokaj esperantistoj, kiuj konas la tieajn fonojn.
- En MONATO la intelektularo de la Esperanto-movado diskutas, fojfoje vikle polemikas pri gravaj temoj de la nuntempa socio.
- MONATO estas la magazino en kiu ankaŭ vi povas aperigi viajn komentojn.
- MONATO plilarĝigas vian spektron de interesiĝo, pro aro da nekutimaj temoj prezentitaj en facile digestebla maniero.
- MONATO pligrandigas vian lingvokonon. Ĝi estas redaktita en bona hodiaŭa Esperanto.



## Abonu ĝin nun!

## La unuaj tri numeroj estos senpagaj!

Skribu al **MONATO**,  
Lange Beeldekenstraat 169, B-2060 Antwerpen, Belgio,  
aŭ rete al [eldonejo@MONATO.be](mailto:eldonejo@MONATO.be) aŭ, eĉ pli facile,  
uzu tuj nian formularon en  
<http://www.esperanto.be/fel/mon/abonilo3.3.php>

AGRABLAN LEGADON!





J. R. R. Tolkien

**LA MASTRO DE L' RINGOJ**

LA KUNULARO DE L' RINGO



J. R. R. Tolkien

**LA MASTRO DE L' RINGOJ**

LA DU TUREGOJ

## *Tolkien en Esperanto*



J. R. R. Tolkien

**LA MASTRO DE L' RINGOJ**

LA REVENO DE LA REĜO



J.R.R. Tolkien

**LA HOBITO**

**aŭ  
tien kaj reen**

*Mendu ĉe via libroservo.*